

Turka Stelo



SALUTON,

Ni jam formanĝis unu kvaronon de la jaro 2022 kaj jen la 76-a kaj aprila numero de nia Turka Stelo revuo estas en viaj manoj.

En Istanbul ĉi-jare estis nekutima peza vintro. Ĉi-jare neĝis multfoje. Mi memoras aian tian neĝoplenan vintron en la jaro 1987. Nur nun en la fino de marto la suno komencis ekbrili kaj la vetero iom post iom ekvarmiĝas.

En ĉi-tiu numero de Turka Stelo revuo estas multaj interesaj tekstoj por legi. Bedaŭrinde la mitologia serio de nia kontribuanto Spiros Sarafian el Grekio jam atingis sian finon.

Ekde la venonta numero mi promesas publikigi felietone, ĉapitro post ĉapitro, la romanon "Mia nomo estas Ruĝa" de la nobelpremiita turka verkisto Orhan Pamuk. La verkoj de Pamuk estas tradukitaj en pli ol 40 lingvojn, tamen ĝis nun eĉ nek unu akireblas en Esperanto.

Por niaj legantoj, kiuj ankoraŭ lernas nian lingvon, ni komencis publikigi tekstojn el la Unua Legolibro de KABE. Ili estas bonaj paŝo post paŝo lerniloj por

komencantoj.

La milito en Ukrainio daŭras kaj ni estas malĝoja pri tio ĉar paco estas tio, kion ni bezonas en nia nuntempa mondo kaj monda strukturo. Bedaŭrinde nia revuo ne estas diskutloko pri tiaj aferoj.

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
La esperantistoj havas nun siajn propran sanktulon!	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Ĉu vi volas trapasi KER-ekzamenon RETE en...	4
Tempo Sigelita	5
MELEAGRO (ΜΕΛΕΑΓΡΟΣ)	6
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	9
El la literaturaj paĝoj de MAS	10
Skatolo	11
Michelle Delaby	11
Misteroj - Elpensita aŭ vera? (6)	12
La Polino - parto 6	12
La aventuroj de Glano en la Lando de... (12)	13
Sub la ĉielarko	16
La vilaĝa historio	17
La plej longa ampoemo en la mondo	18
Ĉu la unua scienc-fikcia libro?	19
Ŝercoj	20
Krucvortenigmo	20
Protagonismo	21
La arbaron kovris ombro	21
Nigra	21
Mi stelojn jungos...	21
Mesaĝo de Setsuko Yamakawa kaj HORI Jasuo el Japanio	22
Ĉiela Vordonisi: La unuaj voĉoj, La unua komunumo (3)	22
EKRA2021 - Poezio - Revulo	23
Hundo sen mastro	24
Kataj historioj	25
Kulpo	25
Benzinkamiono	27
Unua Legolibro - parto 1	29
La stranga gasto de la ĉambro 39	30
Sonĝo ene de sonĝo	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



Ĉe Burdur Mehmet Âkif Ersoy Universitato okazas Esperanto-lingvokurso nome "Esperanto Dili" kiel oficiala registrita universitata kurso elektebla de studentoj el diversaj fakultatoj. La kurson gvidas la univiersitata matematika instruisto Utku Gürdal. Al la kurso aliĝis 15 studentoj. <https://edukado.net/kursejo?kid=27360>

La esperantistoj havas nun siajn propran sanktulon!

Anno Sjoerd Brandsma aŭ monaĥe Titus Brandsma (naskiĝis la 23-an de februaro 1881 en Ugoklooster apud Bolsward, mortis la 26-an de julio 1942 en la koncentrejo Dachau) estis frisa karmelana patro, katolika sacerdoto, martiro, profesoro pri filozofio, verkisto, kontraŭnaziulo kaj **esperantisto**. Brandsma estis ankaŭ specialisto pri mezepoka mistikismo kaj mem mistikulo.

En novembro 1985 Papo Johano Paŭlo la 2-a beatigis lin kiel martiro.

La 4-an de marto 2022 papo Francisko enkanonigis en Vatikano ĉeestinte la publikan ordinaran konsistorion por la proklamo de dekretoj por tri novaj sanktuloj, inter ili Titus Brandsma, kaj fiksas la daton de la kanonigo de Titus Brandsma al la 15-a de majo.

fonto: *wikipedia*



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Revenu al Sumoo! Ĉu vi jam forgesis, ke vi ĝoje legis en Sumoo?

Karaj,

La milito malĝojigas nin. Mi estas tre maltrankvila pro la sorto de ukrainaj sumooistoj. Mi elkore deziras, ke ili vivu en bonordo kaj ke la milito finiĝu plej baldaŭ. Bonvolu varbu viajn konatojn al la sumoo. Precipe oceanianojn kaj afrikanojn.

HORI Jasuo

Sumooj en la jaro 2022

* **januara sumoo**: de la 9a ĝis la 23a de januaro

* **marta sumoo**: de la 13a ĝis la 27a de marto

* **maja sumoo**: de la 8a ĝis la 22a de majo

* **julia sumoo**: de la 10a ĝis la 24a de julio

* **septembra sumoo**: de la 11a ĝis la 25a de septembro

* **novembra sumoo**: de la 13a ĝis la 27a de novembro

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 1031 (2022-03-18)
La 107-a Universala Kongreso: Kanado kaj Kebekio mildigas KOVIM-rilatajn regulojn [...]

N-ro 1030 (2022-03-12)

Interkultura Novelo-Konkurso (INK): 2-a eldono lanĉita kun novaj reguloj [...]

N-ro 1029 (2022-03-08)

Aliĝu al la KER-ekzamena sesio de la 107-a UK, Montrealo: la nivelo C2 premieriĝos [...]

N-ro 1028 (2022-03-07)

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Virina Tago, 8 marto 2022 [...]

N-ro 1027 (2022-03-06)

Instruu Esperanton en Senegaloo kun stipendio (septembro-decembro 2022) [...]

N-ro 1026 (2022-03-05)

Helpo-servo de UEA kaj TEJO responde al la milito en Ukrainio [...]

N-ro 1025 (2022-03-04)

Programo "Ni semas" nun kunordigata de la Afrika Komisiono: subvencipetoj ĝis la 31-a de marto [...]

TEJO



11-03-2022

Malferma alvoko: Iĝu estrarano de TEJO

La 26-an de februaro 2022, la estraranoj de TEJO Alexandre Raymond kaj Uriel Gudián eliris el la estraro. Sekve la Elekta Komisiono malfermas alvokon, kiu serĉas kandidatojn al la estraro de TEJO. Kandidato por iĝi estrarano de TEJO devas... [...]

08-03-2022

Internacia Tago de Virinoj 2022

Verkita de Luana Araújo de França, komisiito de TEJO pri Genra Egaleco Hodiaŭ, la 8-an de marto, estas la Internacia Tago de Virinoj. Krom la omaĝoj, pli gravas memori kial la dato ekzistas. Kvankam estas intencoj montri nur feliĉan... [...]

02-03-2022

Partoprenu seminarion en Italio pri demokratio


La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo (KdE) organizas la internacian seminarion Esplorante Demokration – Junuloj revigligas niajn demokratiojn post-pandemio. La seminario donos la eblon al 20 junuloj de membroŝtatoj de Konsilio de Eŭropo... [...]

28-02-2022

Iĝu Komitatano B de TEJO

En majo 2022 komenciĝas nova mandato de la Komitato de TEJO, kaj ni bonvenigas kandidatiĝojn por komitatano B de TEJO de majo 2022 ĝis aprilo 2024. Komitatanoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo en la supera instanco de... [...]

Leteroj de niaj legantoj



Kara,
Koran dankon pro akurata sendado de plia Turka Stelo.

De kelkaj semajnoj al la konstanta temo, Kovid-19, aldoniĝis la minaco de plialtigo de la konflikto inter Ukrainio kaj Rusujo, ĝis la tankoj kaj bomboj komencis detruadon de vivoj, vivlokoj, espero de iu formo de kompromiso. Almenaŭ eblas dum iom da tempo eskapi legante tiun revuon.

Kortuŝis min la artikolo de Ahmed Belmilud el Alĝerio. Mi loĝis tie ĝis la jaro 1986 kaj alkiutimiĝis dum certaj periodoj al manko de akvo- ĉiun duan tagon ni atendis la bruon en la akvotuboj, kiu anoncis, ke dum kelkaj horoj ni povos pleniĝi kiel eble plej da ujoj.

En somero fajro en Kabilio estis unu el la timigantaj okazaĵoj. La junuloj, kiuj babilis, sidante kontraŭ la muro, foje estis veturigitaj de la aŭtoritatoj por helpi estingi la incendion. Certe la klimatsanĝo ne plibonigas la vivkondiĉojn.

Amike,

Franciska Toubale el Aŭstralio



Merhaba, dankon por la bulteno.
Amike,

Fejfi - Magdaléna Feifičová el Ĉeĥio



Dankojn,
Nuntempe mi partoprenas kuracistajn esplorojn, sed poste mi legos ĝin.

Tre bonaj estas la numeroj, mi volonte legas ilin.

Mi sendas poemon de mi esperantigitan al via ĵurnalo.

Multe da sukcesoj kaj bona sano!

Amike **Adri** el Hungario



Saluton kara,

Mi dankas pro la sendita revueto Turka Stelo nr.75, marto de 2022. Mi kun plezuro legas ĝin. Por la sekvonta numero de TS mi sendas humuraĵon "Vilaĝa historio". Ĝi jam estis publikigita en la lasta numero de "La ondo de Esperanto", tamen mi esperas, ke vi konsentos publikigi ĝin ankaŭ en "Turka Stelo". Ni esperu, ke milito finiĝos, kaj Turka Stelo plu estos eldonata.

Kun bondeziroj

Laimundas Abromas el Litovio



Estimata, Bonan tagon.

Jen alia artikolo por eventuala aperigo.

Jen venonta monato alvenos por memorigi pri Zamenhof. Lia vizio pri la homa justeco

kaj amo sufiĉas por konvinki nin, ke sen ĉi tiuj valoraĵoj la homo iĝus laŭ la historia diraĵo: "Homo homini lupus" (homo malamas homon).

"L'espero, l'obstino kaj la pacienco" (el La Vojo) jen la fundamento de la supozeble kuraĝa homo. Ĝi ankoraŭ validas precipe ĉitempe, kiam verŝajne iu/iuj perdis sian direkcion.

Dankon,

Bondezire.

Carmel Mallia el Malto



Saluton estimata,

De longe mi tre ŝatas legi vian bonegan revuon kaj sukcesis elŝuti ĝin ĝis hodiaŭ. La lastan mi ne plu povas. Bonvolu sendi "La Turka Stelo"-n al mia retadreso. Mi deziras esti abonanto. Koran dankegon... kaj gratulojn pro via valorega laboro favore al nia bela lingvo !
Kun miaj plej amikaj salutoj el Sologne en centra Francio.

Michel Dereyger el Francio

Ĉu vi volas trapasi KER-ekzamenon RETE en junio-julio?

UEA anoncas tri ekzamenperiodojn por la jaro 2022:

- en junio-julio estos eblo rete trapasi ekzamenojn, tio signifas ke ĉiu el sia propra hejmo povos ekzameniĝi,
- en aŭgusto dum la UK kongreso estos paperaj, ĉeestaj ekzamenoj kaj
- fine de novembro en la malnovaj formoj, kadre de la Tutmonda Ekzamentago ni organizos ĉeestajn sesiojn, dise en la mondo.

Por pli da detaloj:

<https://edukado.net/novajhoj?id=869>



AKTOROJ, KIUJN NI NE KONAS

Oni nomas ĝin Internacia Kino aŭ Universala Kino, sed ĉu tio estas tiel?

Mi supozas, ke la averaĝa kinospektanto spektas pli da usonajn filmojn, post aŭ paralele al la filmoj de sia propra lando, ol filmoj de aliaj landoj. La dominanta faktoro en la internacia kinomarkato estas Usono. Kiam mi parolas pri la Eŭropa Kino, la unua afero, kiu venas en mian kapon, estas kinoarto de



Grazyna Szapolowska (Pollando)

Francio kaj Italio. Kompreneble, ekzistas kino-produktaĵoj ankaŭ de aliaj landoj. Ekzemple Ĉinio, Sud-Koreio, Japanio, Barato, Aŭstralio... Sed krom la landoj, kun kiuj, tiuj landoj establis merkatajn rilatojn, iliaj aktoroj ne estas bone konataj en aliaj landoj. Homoj povas koni la filmojn kaj aktojn de tiuj landoj nur ĉe internaciaj kino-festivaloj. Tamen, se vi estas aktoro el Holivudo, plejparto de la mondo certe konas vin. Estas tre bonaj aktoj en Hungario, Pollando, Ĉeĥio, Svedio kaj Finnlando, sed ili ne estas antaŭ niaj okuloj tiel, kiel la holivudaj aktoj. Aŭ kiom da islandaj, norvegaj, novzelandaj, turkaj, grekaj, israelaj ludantoj ni konas? Respondo : Se ili partoprenus en internacia kaj premiita kino produktaĵo, ni ja scius ilin. Alie, ili neniam estos antaŭ niaj okuloj.

Estas landoj, kiuj estas steloj de kinoarto kaj ankaŭ landoj, kiuj estas steloj de politiko kaj ekonomio.



Lajos Ōze (Hungario)

Jes, se ni al tio rigardas logike, estas nenio pri kio, ni surpriziĝu aŭ bedaŭru. La potenca lando ankaŭ lasas sian markon sur la kino-industrio. Ekzistas ankaŭ lando kiel Germanio, kiu ne atingis sufiĉan internacian kino-

famon, eĉ se ĝi estas potenca lando. Jen ludantoj kiel Hanna Schygulla, Armin Mueller-Stahl. Pli maljunaj germanaj aŭ aŭstraj aktoj Horst Buchholz, Kurd Jürgens, Maximilian Schell, Maria Schell, Hardy Krüger restus agnoskitaj ludantoj nur en la enlanda merkato, se ili ne estus en kontakto



kun Holivudo. Germana kinoarto eble estis psikologie ombrita pro la "nazia imago" post la Dua Milito. Germanaj artistoj eble suferis perdon pro ĉi tiu traŭmato.

Mi revenas al mia propra infanaĝo kaj adoleskante: mi kreskis plejparte kun usonaj, francaj kaj italaj filmoj, krom filmoj de la turka kinejo. Kaj ankaŭ kungfu-aj filmoj el Honkongo aŭ Ĉinio. Mi ekkonis la kinejojn kaj aktojn de aliaj landoj ĉe filmfestivaloj. Dum la Malvarma Milito, ni apenaŭ konis la geaktojn de landoj de la Sovetia Bloko. Sed nur la generacio de "cinematheque" en Istanbul* konis ilin. Kaj eble pli poste ni konatiĝis kun ili ĉe la internaciaj kino-festivaloj kaj ankaŭ pro la filmoj alportitaj de kelkaj lokaj individuaj filmistoj.

Holivudo ankaŭ kolektis diversajn artistojn el diversaj landoj. Ekzemploj de tiaj famuloj en la pasinteco estas la hungara/rumana aktoro Béla Lugosi, libandevena aktoro el Egiptio Omar Sharif, rusa/mongola aktoro Yul Brynner, rusa aktoro Akim Tamiroff, hispana aktorino Sarita Montiel, greka aktorino Irene Papas ktp... Se Ingmar Bergman el Svedio ne estus mond-fama reĝisoro ni ne ekkonus geaktojn kiel Liv Ullmann el Norvegio kaj Bibi Andersson, Max von



Jana Brejchová (Ĉeĥio)



Hera Hilmar (Islando)

>>30

En la okcidenta parto de la centra Helenujo estas regiono nomata Etolio (Αιτωλία). Tie, en la fora pasejo, inter aliaj, estis fonditaj du same grandaj kaj potencaj civitoj, Kalidono (Καλυδών) kaj Pleŭrono (Πλευρών). Ŝajnas ke tiuj civitoj estis tre grandaj, kaj riĉaj, ĉar malgraŭ tio, ke ili estas menciataj en la mitoj rakontitaj antaŭ multaj miloj da jaroj, en niaj novaj tempoj estis trovitaj tre interesaj ties restaĵoj, partoj de muregoj, de imponaj sanktejoj, k.s.



Kiel ĉiam okazas, kaj ne nur en la epokoj de la mitoj, sed ankaŭ en la historiaj, eĉ en tiu ĉi nia nuno, la najbaraj civitoj estis inter si en rilatoj unufoje amikaj, aliffoje malamikaj. Estis, do, oftaj konfliktoj, estis militoj, estis pacaj periodoj kaj denove malkonsentoj inter la Kalidonanoj kaj la Kuritoj (Κουρήτες). Kaj tiuj Kuritoj, loĝantoj de Pleŭrono kaj la plej antikvaj loĝantoj de la tuta tiu regiono, apartenis al tribo sovaĝa kaj tre militema, tiele ili estis konstanta minaco por ĉiuj siaj najbaroj. Tamen, la oftaj konfliktoj inter la du najbaraj civitoj ĉesiĝis, kiam la reĝo de Kalidono Ojneo (Οινεύς) edziĝis kun Altaja (Αλθαία), la fratino de la estroj de la Kuritoj. Tiu parenციო portis la deziratan stabilan pacon kaj la prosperon en la tuta regiono.

Tiu Ojneo estis homo bona kaj pacama, eĉ reganto kapabla, prudenta kaj progresema. Li havis tiun nomon, Ojneo, el la vorto "οίνος" (inos), kiu signifas "vino", ĉar, ĝuante la favoron kaj amikecon de Dionizo (Διώνυσος), la dio de la vino, instruite de la dio mem, li lernis kultivi la vinberujon kaj produkti la vinon.

Estis, do, prospero en Kalidono kaj feliĉo en la domo de Ojneo, precipe tiam, kiam naskiĝis la unua lia infano, filo, kiu ricevis la nomon Meleagro.

La naskiĝo de la filo alportis ĝojon, tamen ankaŭ maltrankvilegon kaj timon al la patrino, al Altaja. Tio, ĉar la ĵus akuŝinta virino, mirakle, kvazaŭ en iluzio, kaptis en la imago bildon de la Parcoj (Μοίραι), la tri diinoj, kiuj ĉeestis ĉiun akuŝon kaj antaŭdifinis la destinon de ĉiu novnaskita mortemulo. Kaj en la nebulo de sia fantaziaĵo, ŝajnis al Altaja, ke ŝi aŭdis la Parcojn, kiuj diris, ke la ĵusnaskito havos gloran vivon,

sed ĝi mortos tuj kiam forbrulos la torĉo, kiu estis metita super la lito de la patrino. La virino terurigiinte rekonsciiĝis kaj tuj ŝi estingis la torĉon kaj kaŝis ĝin en malnovan kofron.



Meleagro grandiĝis, li iĝis bela, forta kaj nobla viro. Lia patrino forgesis tiun malnovan malagraban okazintaĵon kaj fieris pro sia, je ĉio kapabla, filo, kiu, pro la troa mildeco de sia patro, tre frue prenis sur sin la taskojn de la regado, precipe la komandadon de la tre forta kalidona armeo. Tamen, la tempoj estis pacaj kaj trankvilaj, oni ne bezonis la armeon, la tuta aktiveco estis direktita al la kutimaj sociaj devoj. Ĉio, do, fluis glate en la feliĉa lando, ĝis kiam Ojneo faris grandan eraron. En solena, granga, mult-taga religia festo, kiu ĉiujare estis aranĝita en la ĉefurbo, honore al la dioj patronoj de la lando, laŭ la kutimo okazis ceremonioj kaj sanktoferoj, aparte al ĉiu dio protektanto de la lando. Tiun fojon, verŝajne pro eraro de la respondaj ceremoniestroj, la reĝo, eble iom ebria, ne sanktoferis al la diino Artemisa (Άρτεμις). La ĉasta, sed rigora diino, kies granda sanktejo estis en la urbo, ne povis toleri tian ofendon, ŝi indignis kaj, kiel ŝi kutimis, punis severe la landon, eble ne supozinte la postsekvojn de tiu puno. Kaj Artemisa, dezirante puni la kulpan landon, sendis al ĝi neordinaran bestion, grandegan kapron, kiu komencis detrui ĉion, mortigi homojn kaj gregojn, ruinigi tutajn vilaĝojn kaj kultivaĵojn. Ĝi estis ne konata besto, sed kaproforma monstro, kiun neniu povis alfronti.

Meleagro prenis sur sin la taskon savi la landon, kaj ĉar li vidis, ke per la ordinara rimedoj oni povis fari nenion li petis helpon. Li sendis mesaĝojn al la plej konataj junaj, fortaj kaj gloraj militistoj kaj herooj de Helenujo, li invitis ilin al ne ordinara ĉasado. Ni diru, ke li aranĝis tion kion nuntempe ni nomas batuo, li organizis tion, kio restis, kiel notinda momento de la helena mitologio, kun la nomo "ĉasado de la kalidona kapro".

Inter la invititaj herooj estis unu virino! Ŝi estis Atalanta (Αταλάντη), la filino de laso (Ιάσος), reĝo de Tegeo (Τεγέα), civito de la helena regiono nomata Arkadio (Αρκαδία). Tiu Atalanta estis ne ordinara virino. Ŝia patro, kiu ne havis gefilojn, kiam post tre longe lia edzino Klimena (Κλυμένη) gravediĝis, arde dezirante akiri filon, kredis ke la dioj kontentigos lian deziron. Tamen, tio ne okazis, naskiĝis knabino, tiu Atalanta.

La reĝo desapontiĝis tiom multe, ke li ne montris la ordinaran atenton kaj la patrajn zorgojn pri sia filino. La knabino estis lasita al la prizorgado de vilaĝanoj kaj montuloj, ŝi grandiĝis en la kamparo, en la montaj

bienoj de la reĝo. Tiele ŝi hardiĝis, spirite kaj korpe, kaj malgraŭ tio, ke ŝi estis tre bela, kun korpo kiun eĉ diinoj enviis, ŝi iĝis tute ne ordinara virino. Ŝi iĝis bonega, nekomparebla ĉasistino, ŝi iĝis tre forta kaj tre kapabla en la luktado kaj en ĉiaj viraj sportoj kaj ceteraj malfacilaj okupoj. La montuloj diradis, ke tio okazis, ĉar la junulino, en siaj unuaj jaroj, estis nutrita per urso lakto. Atalanta precipe estis eksterordinare, vere ekstermezure, rapidpieda. Fakte, ŝi kuris tiel rapide, ke la homoj diris, ke ŝi superas eĉ la plej fortan venton.

La famo pri la ĉaskapablo de Atalanta kaj pri ties granda beleco estis disvastigita en la tutan helenan landon, do, Meleagro, kiu cetere deziris ekkoni la strangan virinon, sendis ankaŭ al ŝi invitmesaĝon, kaj kun ĝojo ricevis la respondon, ke la reĝidino volonte akceptas la inviton.

Estis multaj ankoraŭ renomaj bravuloj, kiuj iris al Kalidono kaj inter tiuj, estis du Kuritoj, fratoj de Altaja, onkloj de Meleagro. Estis Pleksipo (Πλήξιππος) kaj Agenoro (Αγήνωρ), viroj krudaj, sovaĝaj kaj koleremaj. Tiuj du de la komenco montris sian malbonan karakteron kaj intencon. Kiam ili aŭdis ke la ĉasadon partoprenos virino, ili brue protestis. Ankaŭ kelkaj ankoraŭ fieraj bravuloj, kiam vidis ke inter la ĉasistoj estas unu virino, montris klare sian malkontentecon, tamen Meleagro sukcesis kvietigi la koleron de la plej eksciteblaj, kaj por eviti kromajn reagojn, en la plano de la ĉasado, laŭ kiu la ĉasistoj estis dividitaj en duopojn, li metis Atalantan sia kunulo.

La teritorio estis tre vasta, en la plej multaj lokoj monta, kruta kaj densarbara, la monstro senĉese kaj tre rapide moviĝis, alilokiĝis, tiele la ĉasado estis tre malfacila. Kaj ĝi estis ne nur malfacila sed ankaŭ tre danĝera, ĉar la bestio, en la longa daŭro de la ĉasado mult-foje surprizis, ekatakis grupojn da ĉasistoj, mortigis multajn sekvantojn kaj vundis, eĉ serioze, kelkajn el la ĉefaj ĉasistoj.

La naŭan tagon de la ĉasado, la duopo Meleagro - Atalanta renkonis la monstran bestegon en ebena loko. Ĝia aspekto kaj grandeco estis vere terura, tiel ke, la ĉasparo hezitis tuje alproksimiĝi. Meleagro ordonis iliajn helpantojn stari cirkle malproksime kaj bruadi kiel eble plej forte. Poste li faris la unuajn paŝojn al la direkto de la monstro kiu blekadis furioze. Atalanta, kiu komprenis ke eĉ la plej forta kaj kuraĝa viro ne povas fronte ataki la bestegon, retenis Meleagron kaj ŝi komencis inciti la monstron eligante sovaĝajn kriojn kaj rapidege, preskaŭ fulme, kuradis ĉirkaŭ ĝi. La bestego provis sekvi la moviĝon de la ĉasistino, sed ŝi kuris cirkle tiom rapide, ke la monstro povis nek distingi ŝin. Dume, Atalanta ĵetadis pluvon da sagoj kaj mallongaj pikiloj sur la bestion, kiu,



akceptante tiujn pikbatojn, iom-post-iome, komencis perdi fortojn kaj malrapidigi siajn movojn. Meleagro, kiu staris en sekura distanco, vidinte tion, fulme atakis fronte la malfortigitan bestion kaj per sia tuta forto trapikis, traboris ĝin per sia plej peza lanco. La monstro, trafita de dekoj da pikiloj kaj traborita de la peza lanco falis, ĝi iom ŝanceliĝis, provis restari, sed denove falis, ĉio estis ja finita!

La kornoj sonis, la ceteraj ĉasistoj alvenis, kun miro rigardadis la mortigitan enorman bestion. Meleagro, en la ĉeesto de ĉiuj kunĉasistoj, konfesis, ke la vera venkinto, la senduba mortiginto de la monstro estas Atalanta, do, li oferis al ŝi la trofeon, la felon de la bestego.

La decido estis tute justa, tamen kelkaj el la ceteraj ĉasistoj, ne povante akcepti, ke virino superis kaj hontigis ilin, protestis, ne akceptis tion, tamen Meleagro ne cedis, li priskribis detale la batalon, li persistis en sia justa decido, kiun, fine, akceptis preskaŭ ĉiuj.

Mi diras preskaŭ, ĉar la du sovaĝaj Kuritoj, la onkloj de Meleagro ne konvinkiĝis. Ties obstino kaŭzis viglan konflikton, kiu iĝis kverelo, fine kolizio. La ofenditaj Kuritoj alvokis siajn kunulojn kaj post nelonge sovaĝaj batalantoj alvenis kaj devigis Meleagron al batalo, kiu rapide iĝis kruela, tiel, ke multaj viroj el ambaŭ flankoj falis. La ordinara konflikto iĝis vera milito, en kiu Meleagro povis forpuŝi la malamikojn ekster la muregon, eĉ mortigi la du varmegsangajn kaŭzintojn de la kolizio.

Tio estis la komenco de multaj malbonoj. Unue, Altaja, la patrino de Meleagro kaj fratino de la mortigitaj Kuritoj, aŭdinte la malbonan novaĵon, furioze, en stato preskaŭ freneza, en la ĉeesto de multaj personoj, genuiĝis kaj per lamentaj krioj, alvokante la diojn de la suba mondo, peze malbenis Meleagron, sian propran filon, petinte pri ties morto!

Kelkaj diradis, ke Altaja faris ion ankoraŭ pli teruran, ŝi eligis el la kesto la kaŝitan torĉon, ŝi bruligis kaj lasis ĝin forbruli.

Tia ago de patrino ŝajnas tre stranga, tamen ĝi



havas eksplikon. Altaja apartenis al la tribo de la Kuritoj, kies kutimoj entenis restaĵojn de la tre antikva matriarkeco. En tiuj, tre foraj, perditaj en la pasinteco kaj plejparte forgesitaj epokoj, la homoj kredis, ke la plej proksimaj inter si parencoj estas la gefratoj, ĉar en iliaj vejnoj fluas tute egala sango. La

sango de la gefiloj ne estas egala al tiu de la patrino, ĉar ĝi estas miksitita kun la sango de la patro. Tiele, mortigo de frato aŭ fratino nepre postulas venĝon. Tiaj estis la vivreguloj de tiuj malproksimaj tempoj.

Tamen, ĉio tio ĉi estas nur bablado, ĉar la tia, instinkta ni diru, reago de Altaja estis momenta, preskaŭ senvola; tuj pli poste ŝi rekonsciiĝis kaj kompreneble pentis pri sia faro. Tamen, estis malfrue; Meleagro, informite pri la bedaŭrinda evento, en la komenco konfuziĝis. La ago de lia patrino vundis lin kiel mortiga glavo, li afliktiĝis, li ĉagreniĝis, fine li koleregis, do, li retiriĝis de la batal-fronto, li iris kaj enfermiĝis en sia domo, li deziris akcepti kaj paroli al neniuj.

Tio kaŭzis ankoraŭ pli grandan malbonon, ĉar la armeo de Kalidono sen la komando de sia glora estro, estis preskaŭ alia, tute senforta. Ojneo ne estis kapabla militestro, sen Meleagro la armeo de la lando estis kondamnita al certa pereco, des pli, ke la Kuritoj, kuraĝiĝinte, fortigis siajn atakojn kaj post nelonge invadis kaj komencis predi kaj detru la landon de la Kalidonanoj. La armeestroj, vane sendadis al Meleagro dramajn mesaĝojn petegante pri lia helpo; la heroo restis indiferenta al la petoj, tute desapontiĝinta kaj malespera.

Kiam la afero atingis la plej krizan punkton, kiam preskaŭ la duona lando estis forbruligita de la sovaĝaj malamiko, Kleopatra (Κλεοπάτρα), la edzino de Meleagro, aliris, eble por la centa fojo, al sia amata edzo, ŝi klopodis ankoraŭfoje lin konsoli kaj kuraĝigi, fine, konsumite de la petegoj, de la despero, de la malĝojo, preskaŭ sveninta, ŝi falis genue antaŭ li kaj kun varmegaj, pezaj larmoj petegis lin rekonsciiĝi.

Tiu neretenebla eksplodo de la lamentado, la tiom pasia eksteriĝo de malĝojo de Kleopatra, la tuta, tiom

kompatinda bildo de la virino skuis, krude emociis Meleagron, kiu ne povis suferi la tian desperon de sia amata edzino. Li reakiris la konscion, li eksaltis, li sin armis per siaj plej pezaj, plej mortigaj bataliloj kaj fulme rajdis al la batakkampo.

La Kalidonaroj, ekvidinte lin, rekuraĝiĝis, la malamikoj panikiĝis kaj ĉio sekvis sian vojon, la armeo de Meleagro, post sinsekvaj venkoj en kruelaj, ekstreme sangaj bataloj, forpuŝis, plenvenkis kaj detruis, preskaŭ ekstermis la armeon de la Kuritoj.

Ekregis entuziasmo, plenkontenteco, venis denove en la landon feliĉo, ĝenerala, ne retenebla ĝojo, tamen la destino ne povus esti ŝanĝita, tiel, dum la fina batalo, kiam ĉio estis favore atingita, peza sago trafis, trapikis la bruston de Meleagro. La glora heroo, en nur unu momento, falis, mortis!

Estis disvastigitaj diversaj famoj. Kelkaj kredis, ke la sago trafis Meleagron ĝuste la momenton, kiam forbrulis tiu fatala torĉo, kiun Altaja forgesis estingi. Aliaj diradis, ke la mortiga sago estis pafita de la dio Apolono (Απόλλων) mem, la patrono de la Kuritoj, kiu ne povis toleri la tiom severan moleston kaj humiligon de siaj protektatoj.

Sendepende de ĉio tio ĉi, la mizera fakto estas, ke la ĝojon sekvis ĝenerala lamentado, peza tutlanda daŭra funebro.

Kaj ne estis ankoraŭ la fino, ĉar kiam la senviva korpo de la heroo estis transportita en la palacon, Altaja, kredante, ke tiu ŝia senpripensa malbeno kaŭzis la morton de sia filo, sinmortigis. En same malespera stato, ankaŭ Kleopatra, la malfeliĉa vidvino, pensante ke ŝiaj larmoj estis tiuj kiuj puŝis ŝian edzon iri al la bataltereno, ne povis elteni la tiom pezan kulpecon, do, ankaŭ ŝi mortigis sin, la saman tagon.

La terure malfeliĉa fino de la brila viro, veninta la momenton en kiu li atingis la kulminon de sia gloro, kortuŝis ankaŭ la diojn. Tiele, Artemisa, vidante, ke la fratinoj de Meleagro longatempe, nekonsoleble priploradis sian amatan mortinton, kompatis kaj aliformigis ilin en birdojn. Tiele ekaperis en la mondon la konataj nuntempe galinofarmaj meleagro (μελεαγρίδες), kies la monotona pepado tute similas al homa, eĉ virina plorĝemado.

La historio de Meleagro emociis multajn verkistojn, eĉ la tre grandajn antikv-helenajn tragedieverkistojn, Sofoklon (Σοφοκλής), Eŭripidon (Ευριπίδης) kaj Friniĥon (Φρύνιχος), kiuj postlasis belajn verkojn pri ĝi. Meleagro tamen inspiris ankaŭ multajn renomajn fremdajn artistojn, plejparte pentristojn. Tiele, Meleagro restas vivanta ne nur en libroj, sed ankaŭ en multaj grandaj muzeoj de la mondo.

GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA
TREZORO

(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo

-- el retejo OLE

Ivan Ŝirjaev (1877-1933)

Kiu estis Ivan
Genadjeviĉ
Ŝirjaev?

Sur la frontpaĝo de
Enciklopedio de
Esperanto, unua eldono,
1933, oni legas lian
nomon kun aldonita
kruco indikanta, ke li
estas morta; efektive li
mortis en tiu sama jaro.



Du pliaj informoj sekvas lian nomon: iniciatinto kaj
ĉefredaktoro. En la artikolo pri li en la Enciklopedio oni
povas legi, ke li dum pluraj jaroj kolektis 2092 artikolojn
alfabete ordigitajn sub la titolo “E-Enciklopedio” kiuj
fariĝis la kerno de la duvoluma verko “Enciklopedio de
Esperanto”, eldonita de Literatura Mondo. En ties
antaŭparolo oni povas legi, ke Ŝirjaev sendis sian
laboraĵon al Literatura Mondo “en sep malgrandaj kaj
unu granda manuskribitaj kajeroj”. La redaktoroj
bedaŭris, ke li ne povis ĝisvivi “la disbranĉiĝon de la
arbo, kiu kreskis el la nobla semo de lia valora iniciato”.
Pro siaj meritoj li ricevis la titolon “iniciatinto
ĉefredaktoro”. Liaj meritoj estis multaj, kvankam nur
lastatempe lia verkista talento estis reveke agnoskita
per la publikigo de lia granda romano, “Sen titolo”,
kuŝanta kiel manuskripto dum jardekoj.

Ivan Ŝirjaev naskiĝis la 11-an de aprilo 1877 en
Vereteja, gubernio Jaroslav, carisma Rusio. Unue li
laboris kiel instruisto kaj poste li servis kiel vilaĝa
pastro. Li lernis Esperanton en 1895 kaj post tio
seninterrompe dediĉis sin al la laboro por la internacia
lingvo. Li mortis la 6-an de novembro 1933.

Ŝirjaev aperigis siajn verkojn en gazetoj kaj
libretoj. Krom tio konserviĝis liaj verkoj originalaj kaj
tradukitaj en manuskriptoj, pri kies verkojaroj ne estas
normale konite, kiel kutime estas ĉe Ŝirjaev. Simplige
oni povas praktike dividi lian verkaron en tri partojn.
Unue estas verkoj publikigitaj antaŭ lia morto, due
konservitaj manuskriptoj, trie la eldona projekto
komencita en 1991 de Herbert Mayer direktoro de la
Esperantomuzeo en Vieno.

Lia unua kolekto de noveloj, Sep noveloj, aperis
en 1906 (sub la pseŭdonimo “Ivan Malfeliĉulo”). Ĝi

konsistis el noveloj aperintaj en la revuo Lingvo
Internacia kies ĉefredaktoro Théophile Cart laŭdis
entuziasme la personan, originalan senton de la
noveloj. Estis jam klare, ke Ŝirjaev havis naturan
talenton por krei rakontojn de literatura valoro. Sekvis
novelo en brajla preso, La Ciganino (1907) kaj dua
eldono de Sep noveloj en la posta jaro. Post kelkaj jaroj
sekvis du novel-kolektoj: Tra la loko ensorĉita (1913)
kaj Forta impresio (1914). Unu lia kolekto de noveloj
aperis en la jaro antaŭ lia morto, Peko de Kain (1932).
Post lia morto aperis unu plia kolekto, En la vagono kaj
aliaj rakontoj (1937). Jena komento pri lia arto aperis
en 33 rakontoj, la Esperanta novelarto (Stafeto 1974):
“Li estis inspirita novelisto, kiu en sia izoleco montris
sin profunda observemulo. Lia kelkfoje miniatura,
aliloke verva prezentmaniero kaj stilo kvalifikis lin por
esti novelisto de rango.”

Oni povus imagi, kion faris Ŝirjaev dum la tempo
de milito kaj transformiĝo de lia patrolando Rusio.
Probable li komencis traduki majstroverkojn el la rusa
literaturo, La fratoj Karamazov de Dostojevskij, Milito
kaj paco de Tolstoj, kaj aliajn, kies manuskriptojn li
postlasis sen espero de eldono.

Feliĉe okazis reveko de la preskaŭ forgesita
verkisto komence de naŭdekaj jaroj fare de Herbert
Mayer. En 1991 li eldonis la novelon Inkubo kaj en
1993 la kolekton La dormanta grafino kaj la novelegon
(aŭ romaneton) La nova vivo. Kaj en 1995 li aperigis la
grandan romanon de Ŝirjaev Sen titolo, kiu kuŝis kiel
manuskripto de 60 ĝis 90 jaroj, la verkojaro(j) estas
nekonata(j), verko parte membiografia, parte fantazia.
La historia tempo de la romano estas en la lasta
jardeko de la 19-a jarcento kaj la okazaraj lokoj vilaĝo
kaj nordrusa urbo. La ĉefpersono estas la junulo Joĉjo,
kiu studas por fariĝi pastro, la ĉefa temo estas lia
junula evoluo, liaj sentoj kaj sintenoj al knabinoj kaj al
la multaj personoj en la romano, ĉiu kun sia propra
karaktero. La stilo estas aparte atentinda, nature flua
kaj detala, tiel ekzemple estas priskribita varmega tago
komence de la romano:

*Estis varmega julia posttagmezo. La suno
netolereble bruligis la teron kaj la senmovan, sekan
aeron. Apudvojaj arboj kun foliaro polvokovrita kaj
malgaje pendantaj branĉoj, herbaro velka kaj
flaviĝanta, birdoj, jam delonge ĉesintaj kantadon kaj sin
kaŝintaj en la ombro de densaj arbetoj, – ĉio suferis pro*

la nekutima varmego kaj pro la longedaŭra sekeco, ĉio soifis pluvon.

Ivan Sirjaev estis revekita el jardekojn longa neglekto danke al la direktoro de la Esperantomuzeo en Vieno, Herbert Mayer. Ŝirjaev revenis en la prozan literaturon de Esperanto kun agrabla surprizo, kiu ne

forlasos la scivolemajn legantojn.

de **Baldur Ragnarsson**

artikolo verkita por **Juna amiko**

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/sirjaev.html>

el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

Boto Ŝtraŭso 1: Pri amo

Historioj kaj maloj

Fabeloj pri viro kaj virino

Amakcidentoj

La luktistino

Vidu jen, ŝi venas de la oriento. Ĉion ŝia malŝparema amiko plibonigis ĉe ŝi, la vestaĵojn desupre ĝis sube freŝaj kaj okcidentaj, francaj koltuko, bluzo, veŝto, sed itala la ŝuo. Nur la okulvitrojn ili forgesis. Ties kadro estas ankoraŭ de la oriento. Ĉe la okulvitroj vi povas klare vidi, de kie ŝi venas. Solene ŝi iris en sian unuan grandan dependecon, sekvante viron translimen, kun kiu ŝi konatiĝis dum liaj katedralstudoj en Magdeburgo. Post jaro kaj duono da feliĉa rilato enŝteliĝas la unuaj momentoj de reciproka ekkono. Sed dum ŝi post ĉiu transvivita vakuo amas lin de pli mature, la pentristo baldaŭ ne povas kaŝi, ke li trosatiĝis ŝin, nereverseblan, simple kiel ĉi-lande oni iam trosatiĝas portitajn ŝuojn, tukojn kaj okulvitrajn kadrojn, sen grava kaŭzo. Oni ĉiam trovas ion pli bonan. Kaj pikadas seneme en la belajn manĝaĵojn, seneme en la plej belajn koksojn.

Dum unu nokto ŝi, kiun li ne plu volas vidi, staras sube sur la strato kaj vokas lian nomon supren al la fenestro. Li ne moviĝas supre en sia ateliero - nur ne fari ombrojn. La dompordo restas ŝlosita. Ŝi kuŝiĝas sur la kapoto de lia blanka Citroeno. Ploras kaj dormetas. Kelkfoje ŝi vekigis kaj frapas per la mano krake sur la kapotan ladon. Ne! Ne! Ne!, kriegas ŝi. Poste ŝi resinkas kap-kapoten, ploras kaj dormetas.

De kie mi nur havas tian damnitan povon, sin demandas la pentristo supre, ke alia homo povas tiom submetiĝi antaŭ mi? Li sidas ĉagrenite en sia granda, nuda fabriketaĝo, sia ateliero. La fenestroj staras ankoraŭ duone malfermitaj, tiel ke envenas ŝia bruado kaj vokado. Leĝera vento alblovas la matenon. En la radio, ĉe la 'muzik' ĝis frumateno, la amuzisto⁷ jam delonge iris hejmen kaj lia kolego, kiu ĉiuhore legas la

novaĵojn, ligas nun la melodiojn kun memfaritaj versoj. "Muzik' en tiu nokta ĝojo / tiu bela melodi' / iras nun laŭ sia vojo / ŝvebas nun al vi." Sed nur ne havi povon! Super neni! Povo en ĉiu formo estas ridinda kaj abomena, ankaŭ en la plej eta angulo, ankaŭ kaj precipe en la amo, kie iu rapide fariĝas descendulo⁸ en la okuloj de la alia.

"Alvoku min!" ŝi subite kriegas tie sube, "lasu min scii, kion vi faras! Kiel vi fartas. Ne elkludu⁹ min!"

La ĉagrenito rigardas tra la fenestro al la golgato de la televidantenoj tie sur la tegmento de la banko. Ĝia malluma skobalito komencas speguli. En la alto fluas polvaj flavaj nuboj kun svingantaj franĝoj. Viro ne bezonas virinon. Viro bezonas neniun. Tiom dependa ŝi fariĝis de li kaj de ĉio, kion li eliĝis, ke ŝi transprenis eĉ liajn virinmalŝatajn opiniojn kaj papagis ilin ĝis malaltigo de aliaj virinoj, eksproprigita ĝisekstreme. Pli da profundo ol duopan tiuj virinoj neniam spertis.

Jen rea vokado desube. "Mi volas repaciĝi kun vi, eĉ nur repaciĝi mi volas kun vi. Tiel mi ne povas foriri."

Li hontas pro la najbaroj, estas la kvina matene. Oni devus voki la policon... Ho dio, kiel mizere! Damnita mensogomondo de la rilatoj! Ĝi rompas la plej sanan animon, rompas la plej sanajn burĝonon, ŝoson, impulson kaj instinkton¹⁰.

Antaŭ la okuloj de la pentristo aperas scenoj kaj diversaj bildoj. Rande de rajdturniro dum dimanĉa posttagmezo. Lia amikino en la rondo de novaj akompanantinoj, kiujn li ne konas. En alia grupo, ne malproksime, ŝia amato (li mem), al kiu ŝi rigardas, la brakojn sub la brusto interplektitaj, kiel tra boksejo, meze de siaj zorigistoj, al la kontraŭulo en la plej peza de ĉiuj pezklasoj. Ŝi mezuras lin fride, klare, antikve. Ŝia amato, en sia rondo, faras ŝercon. Sed ĉe tio li rigardas al ŝi kaj esploras ŝian rigidan vizaĝon. Tiu brava, intime konata vizaĝo de lia amikino subite iom antaŭstaras, kvazaŭ helmomasko, malantaŭ kiu vivas iu nekonato kaj elspionas. Maljuneta virino el ŝia stabo donas ankoraŭ lastan konsilon: bloku, pinĉu, ŝparu fortojn. La luktistino kapjesas. Neŝancelebla la malamo, la fremda rigardo, la agresemo. Tamen, eĉ tiun raŭndon li gajnas laŭ trafopunktoj. La virino



restumblas en sian angulon por zorgado. La amikinoj klinas sin super ŝin, parolas al ŝi kuraĝige, ŝanĝas la taktikon. Ili demandas nun, ĉu ŝi sentas sin sufiĉe forta, por tiu venonta, malfrua raŭndo ankoraŭ tralukti al la decido. La virino en sia angulo jesigas la pendantan kapon kaj diras plore: "Jes, jes." Ĉu ŝi kredas sin kapabla nun subite komenci per atako, trarompi lian ŝirmon el duona distanco. Jes, jes, kapjesas la duone senkonscia kaj ploras mizere, sveninte en la vakuon de luktopaŭzo. La luktopaŭzo, dum kiu ŝia vivo unufale deglitas de ŝi ...

Nun ŝi kuŝas sur la kapoto de la blanka Citroeno, la kapon enfosigite en la kubutoj, kaj verŝajne nun estas fine endormiĝinta. Dormu, dormu! ... Baldaŭ vi partumos ĝojon kaj malon kun iu alia. KREDU MIN, DE

unu tago al alia vi transiĝos en ies alia biografio kaj tie ĝoje akomodigis kiel en novan domon kaj matene post la unua nokto jam senplie prenos la manĝilaron el la kuireja ŝranko, kvazaŭ ĝi estintus ĉiam via.

<http://vlutermano.free.fr/Strauss3.html>

¹ *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Skatolo

fabloj de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Ni ofte pensas pri fervor'
Kaj pri neceso de labor',
Ja kie taŭgas nur konjekto
Por simpla solvo de projekto.
De fama majstro venis Skatoleto'.
Belega estis ĝi, plej luksa en figuro,
Kaj ĉiu pri Skatolo' admiris sen mezuro.
"Skatolo estas kun sekreto',"
Proklamas nun saĝulo' de meĥaniko:
"Forestas en Skatolo' seruro'.
Kaj tamen mi malfermos ĝin, amiko.
Sed vi ne moku tion nur!
Sekreton solvos mi sendube kun sukces',
En meĥaniko' mi majstras iom, jes."
Do li komencis studon por afer',
Cerbumas zorge pri mistero',

Aplikas li por provo ĉian frapon,
Jen premas li najleton, jen la klapon,
Sed vana estas la turmento'.
Balancas iu kapon,
Jen oni flustras moke en silento'.
Kaj oni aŭdas jam senĉese:
"Ne tiel, tute ne! Denove malsukcese!"
Li ŝvitis sen ripozo', laciĝis ĝis la fino',
Kaj laste lasis lin obstino'.
Malfermo de Skatolo' enigmis sen ŝlosilo,
Sed simpla estis ĝi — per levo de kovrilo.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)
Ukrainio

Michelle Delaby

Dum mi laboris en la Akademia Inspektejo, mi konis certan Michelle Delaby; ŝi flugis en klubo de varmaerbalonoj; jes tiutempe la vivnivelo de la mezfrancoj estis klare pli alta ol nun!

Ŝi havis talenton por la ornamarto vere rimarkindan, kaj ĉiujare la Amikaro* petis al ŝi fari la Kristnaskan dekoracion en la kafumejo de la Inspektejo, kion ŝi faris kun delikata gusto.

La lastan fojon, kiam mi vidis ŝin, eble antaŭ dekdu jaroj, ŝi malbone impresis, ŝi tanĝis nervozan deprimon, kaj ŝi parolis pri ĉiuj ĉi tiuj "hard Discount" (rabatistaj superbazaroj), kiujn ni komencis vidi multobloĝi kiel fungoj ĉie...

kaj ... Jes jen, ni venas al la kialo de ĉi tiu bileto !

Ŝi, kiu kutimis butikumi en klasikaj hiperbazaroj, monstraj lokoj kun tamen zorgoj pri dekoracio kaj kvalito de la produktoj vendataj, estis terurigita de ĉi tiu evoluo, kaj ŝi diris ion kiel - "Mi ne scias, kio okazas,

verkis kaj sendis Roland Platteau el Francio

kion oni volas kutimigi al ni." Unuvorte, ŝi sentis svage, ŝi diris tion per duonvorto, oni kreis subnivelaĵn-superbazarojn, aŭsteraĵn kaj eĉ pli malmultekostaĵn ol klasikajn superbazarojn, ĉar oni planis malpliigi la aĉetpovon de la francoj, kaj ke ili kutimiĝu nur reduktante sin per sub-kvalitoj, por subprezoj, en subdekoraciaj subbazaroj (kies dungitoj estas subkutime mistraktataj); se ili mallevis la kvaliton de la firmaoj, tio estis ja ĉar ili planis redukti la vivnivelon de mezfrancoj. Ŝi sentis tion!

Ĉi tiu virino, sufiĉe ordinara francino de la epoko, kaj kiu estis edziĝinta al komercisto pri pneŭoj, kaj videble vidis la vivon de la vidpunkto de sia umbiliko, kiel multaj, havis certe nenion marksisman kulturon, sed ĉu eĉ ŝi sciis, ke tio nomiĝas "la klasbatalo"?

Kiel la fama Usona miliardulo Warren-Buffet diris **"la klasbatalo ja ekzistas, kaj ĝi estas mia klaso, kiu**



* Ĉar estis tiam "Amikaroj" kutime en ĉiuj laborkomunumoj, kaj ili proponis aktivecojn, balojn, sportskipojn, festojn, kunvojaĝojn; poste malpli kaj

verkis **Roland Platteau** bazita sur persona memoraĵo

Misteroj - Elpensita aŭ vera? (6)

-- rakonto de Erik Tantal



Ideoj

„Kie estas Rudi kaj Gerd?“, demandis Karl.

„Mi ankaŭ ne scias. Povas ja esti ke ili hodiaŭ planis ion pli bonan. Sed kial ili ne informis nin?“, Jens demandis.

Do, la hodiaŭa prelego devis esti nuligita. Jan kaj Karl

konsiliĝis pri la ebla sinsekvo de la venonta rondo.

„Kiajn temojn ni volas trakti ankoraŭ? Ĉu vi havas proponojn, Karl?“

„Mi ne certas. Kion vi pensas pri 'piramidoj'?“

„Tio tute ne taŭgas. Estas ja tre eluzita temo, mi pensas. Ne, ne denove tiuj malnovaj rakontoj!“

„Kion vi pensas pri ekskurso al la mirinda mondo de la bestoj kaj la plantoj? Tie ni certe trovos ion. Ĉu ne?“

„Jes, bona ideo. Ni faru tion. Mi preparos raporton por la venonta kunveno. Sed Gerd certe volas refari sian prelegon. Hodiaŭ estis ja lia vico.“

La du maljunuloj mendis ankoraŭ tason da kafo kaj daŭrigis la babiladon sen plano.

„Ĉu vi aŭdis, ke ĉe Amazon la resenditaj kaj reklamaciitaj varoj estas simple forĵetitaj?“ demandis Jens kolere. Ankaŭ Karl ekindignis.

„Jes, tio vere estas skandalo. Kial ili ne simple fordonas la varojn kiel donacojn al mizeruloj, se denova vendado ne eblas?“

„Mi aŭdis, ke tio ne estas tiel simpla afero. Se la firmao fordonacus tiajn varojn al bezonatuloj, impostoj estas pagendaj. Kaj tio estas pli multekosta ol forĵeti tion.“

„Vere, stultaĵo. Ĉu la bakisto, kiu fordonacas siajn ne venditajn bulkojn al senhejmuloj, devas ankaŭ pagi impostojn por tio?“

„Kurioze jes. Sed verŝajne plejofte la impostoficejo rezignas pri la enspezo de la impostoj. Ili tiam fermas la okulojn. Kelkfoje la bakisto vendas la tutan stakon por simbola prezo de unu Eŭro. Ja, estus vere malbone, se la ŝtato gajnus pro tiuj donacoj.“

Gerd intertempe alvokis per poŝtelefono. Li promesis denove ĉeesti je la venonta fojo. Jens proponis elekti kromajn temojn.

„Kion vi pensas. Ĉu la temo 'Supernaturaj fenomenoj' estus taŭga?“

„Ho, tio estus eventuale tro esotera. Atendu la elstarajn sugestojn de la aliaj!“, proponis Karl.


(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

Fonto: <http://esperanto-klaus.de/>

La Polino - parto 6 (rakonto de Bayram Karabolli)

tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio



Bayram Karabolli

(daŭrigata)

La novjaran feston oni celebris ĉe la frato de Fatmir. Al Vera ege impresis la granda graveco por tiu festo kaj la bona familia organiziĝo dediĉite al tio. La festo daŭris du-tri tagojn kun familiaj vizitoj ĉe najbaroj kaj ĉe parenkaro. Denove tiuj karakterizaj bonaŭguroj. Ĉi tiujn ŝi notis en kajero, simple pro lingva intereso. Kvankam oni ne volis okupigi ŝin per hejmaj taskoj pro ŝia gravedeco, Vera ekkuiradis. Ŝi scivolemigis pri flano, pri kaĉo kaj precipe pri baklava. Neniam ŝi ne bongustis



tian meleagron kiel ĉi tie.

La trian tagon Fatmir foriris. Vera restispor pasigi la januarajn lerneajn ferioj kune kun panjo Dilja, la bofratino kaj du etaj nevinoj.

La du semajnoj de feriado jam flugis, malgraŭ ke Vera ne volis tion. Kiom foje ŝi memoris pri la lernejo, ekstristiĝis.

Sed la lecionoj rekomenciĝis. Ankaŭ la lernokurso de la rusa. Kiel ekspektite, ŝin alvokis denove al la oficejo de la ĉefo.

- Vera mi havis grandan sopiron pri vi. Apenaŭ mi atendis ke vi revenu- diris Kapo Alushi kaj ĉirkaŭbrakis kaj kisis ŝin volupte.

Poste li demandis ŝin kiel pasigis la feriojn, ĉu ŝi jam ripozis sufiĉe ktp. Vera respondis kurte, sed dume ĝentile, aŭ iel konfuzite pro tiu malfacila situacio, ankaŭ ŝi demandis lin kiel pasigis la Novjaran feston. Tiun ioman babilon ŝi koncentrigis ĉe la majesteco de ĉi tiu familia festo en Albanio kaj multvarieco de bonaĝuroj kiuj envere impresis ŝin multe. Kiel ajn la renkontiĝo notis varmajn momentojn por Kapo Alushi.

- Vera, mi pensas ke ni renkontiĝu ĉisemajne. Ĉio aranĝitos kiel eble plej bone- eliris li tie kie al li dolorigis, frotante la manon de Vera.

Vera, neatendite, ekstarigis, malfermis la grandan surtuton kaj montris al li sian ventron.

Nun rimarkis Kapo Alushi ke ŝi envere havis kreskintan ventron. Eble la dikaj vintraj vestoj estis kaŝintaj tion ĉe Vera.

- Vidu kiel mi estas- diris ŝi- havu paciencon ĝis mi naskos bebon kaj...poste.. Mi petas.

Kapo Alushi, senluziigite pri kio li estis pretigite, sed ankaŭ konvinkite ke li atingis ja sian celon, pravigis ŝin, kisis kaj poste ili disiĝis.

La naskigo de Vera ŝanĝis la monotonan fluon en la familia vivo. Ne estis sciite kiu estis pli ĝoja. Panjo Dilja ĝojiĝis same kiel tagon de la alveno de Vera. Al

Vera turniĝis la perdita feliĉo. Ŝi estis enteninta en sia ventro naŭ monatojn tiun kiu nun estis jam ekster ŝi. Rigardis tiun malfortikan kreitaĵon nomece sed ankaŭ mire kvazaŭ ŝi ne kredus ke mem estis la ties kreinto. Ĉu vere mi estas nun patrino?

La lastan monaton de la gravedperiodo Vera pasigis la tempon kune kun Fatmir, kiu estis liberigita de troa ŝarĝo de la laboraĵoj. Nun Fatmir iris kaj revenis, kvazaŭ flugis, de hospitalo al la hejmo. Ofte lin akompanis la patrino. Vera volis filinon kaj tiel naskiĝis. La etulino havis la brunan koloron de Fatmir. Samtiel ankaŭ la hararo similis. La okuloj estis kiel tiuj de Vera, sed iom pli blujaj.

Elhospitaliĝinte, la bopatrino venigis ŝin hejmen per taksio. Fatmir pretigis la lulilo-liton, kelkajn vestojn kaj malsupreniris por atendi. Alveninte ĉe la pordosoĵlo, panjo Dilja haltigis ilin. Malfermis la pordon, sed ne eniris. Eniros la unua la nova gasto, tiom ekspektita kaj prenis la etulinon, tenante ŝin enmane atenteme, tuŝigis ties piedojn surteren kaj diris:

- Eniru. Venu, estu bonŝanca kaj alportu filon!

- E, ĉu mi ne diris vin ke vi faru filon por la panjo?!- diris Fatmir al Vera okulumante.

Poste turnis sin al la patrino kaj diris:- Panjo, mia edzino ne obeis min, sed ne zorgu, alian fojon mi decidis. Post jaro vi karesos ankaŭ filon.

- La veron dirante mi ege dezirus filon, tamen la junedzino alportis ĉi tiun belegan knabinon kaj mi ne scias kion diri.- kaj panjo Dilja daŭrigis luli la bebon ĉe sin, kantante belan lulkanton.

- Atendu - diris Vera al Fatmir. - Mi volas aŭskulti kiel kantas la panjo. Mi neniam aŭdis tiel mirindan kazon.

(daŭrigota)

rakonto de **Bajram Karaboli**
tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj -- de Vytautas Petkevičius

tradukis kaj sendis
Antanas Vaitkevičius el Litovio

12. Laŭ la spuroj de Fazeolino

La fortuno estis favora, ĉar la kavaleriistoj troardiĝis kaj en la kanonon ŝovegis multfoje pli da pulvo ol bezonata. Kompreneble, la kanona tubo maltoleris la teruran premon kaj dispeciĝis en etajn erojn, do la obuso ne veturis al la Luno, sed nur repuŝiĝis de la unua malalte movanta nubeto, kaj turnis sin reen.

- Nun ni pereos! – ĉirkaŭprenis sian kapon Glano.

La obuso ŝprucfalis en ian flakon, saltis, refalis kaj resaltante de la akvosurfaco eble kvindek fojojn,

enŝtopiĝis en la bordon.

Rekonsciiĝintaj amikoj ekrigardis tra la breĉoj de la disŝirinta obuso. Ĉi situe ĉiuj ordenoj kaj medaloj de Sabalbono estis bezonataj. Ili per la oro kaj arĝento ekskrapis duran kiel ŝtonon ŝelon de la bambua obuso. Ju pli larĝiĝis la aperturo, des pli Glano furioziĝis:

- Mi montros al ili! Mi ne pardonos ilin!

Ili laboris unu tagon, du tagojn, duonon de la tria kaj la amikoj estis havintaj nenian manĝaĵon en siaj buŝoj.



- Kial vi silentas?- ne eltenis Glano.
 - Mi ne surhavis la militjakon de Sabalbono, ke mi pro nenia kaŭzo ekblasfemu, -respondjetis Pizo kaj daŭrigis sian laboron, neatentante la ardulon.
 - Pugnobatu mian orelon, sed ne silentu, - malcedis la kverkido.
 - Estus bone, se tio sufiĉus,- elspiris la verdvanga amiko.
 Kiam la aperturo iĝis sufiĉe granda, li unua elgrimpis eksteren kaj tenante sin per ambaŭ manoj, kun grandaj penoj eltiregis Glanon el la malvasta kanona obuso, kiu povis ekesti ilia tombo.
 Elgrimpinte eksteren, la amikoj ekvidis, ke ili estis enŝtopiĝintaj en muskobulon, kaj ĉie ĉirkaŭe vastiĝis ia neelvadebla marĉiĝinta lago.
 - Nu, al kiu vi nun venĝos? – demandis Pizo Glanon.
 La hontiĝinta amiko mallevis kapon.
 - Vi vidas, kiom ni devis pagi pro via malsingardemo, - kvazaŭ per sablopapero Rapidulo purigis la ruston de fiero kaj fanfaronado for de sia amiko.- Ni interkonsentis homece, tamen vi apenaŭ vestiĝinte kiel Sabalbono, tuj perdis kapon.
 - Mi ne povis aliel.
 Pizo trovis kelkajn sekiĝintajn, forlasitajn de birdoj, beretojn kaj donis al Glano:
 - Maĉu. Eble almenaŭ manĝante vi silentos, sinjorego de ĉiuj faboj.
 Glano eksilentis kaj senvorte kreadis planojn kiel foriĝi de tiu abomena bulo, elstaranta el marĉo.
 - Ĉiu estaĵo tiamaniere por la bono repagas, - li reelspiris.
 Pizo ankaŭ ne eltenis:
 - Silentiĝu! Kiu estas ni? Kian bonon ni faris? Fazeolino savis niajn vivojn, kaj kiel ni dankis ŝin? Ni amikiĝis kun la infanterianoj de Sabalbono, liajn subterejojn trarigardis, raviĝis per liaj brilajetoj, kaj ŝi, mizerulino, tiutempe en subterejo sidis. Pro tiaj meritoj ni ne sufiĉe estis rekompenciitaj. Ni ne kapablas apreci amikecon.
 Ĉi foje Glano silentiĝis por longa tempo.
 Tiel la du amikoj sidis sur tiu malgranda bulo kaj nenion povis pripensi. Pasis ankoraŭ kelkaj tagoj. Finiĝis beroj. La kverkido skribis ion-ajn en sian kajeron, kaj Pizeto balancigis piedojn kaj kraĉadis en la akvon. Subite li kaptis manon de sia amiko kaj montris per fingro en la akvon:
 - Ĉu vi nenion vidas?
 - Io movetas, enmiksiĝinta en herbojn.
 Glano formetis siajn skribilojn, urĝe forprenis la bireton kaj subakviĝinte ekvidis, ke tie estis Karaseto, trafinta malsukceson.

- Virĉjo, tie inter la herboj estas sufiĉe da fiŝsupo, kaj tuta monto da fiŝaĵo kaj ankaŭ gelatenaĵo, - krietis elnaĝintulo al la amiko. – Senvestiĝu por helpi min Karaseton sur la bulon eltiri.
 - Mi eĉ ne pensas pri tio,- respondjetis Rapiduleto.
 – Mi ne estas al kutimiĝinta fari bonon por iu, ke poste mi formanĝu lin.
 Glano nenion respondis kaj resubakviĝinte kun penoj elherbaĉigis la mallertulon. Karaseto elnaĝis surfacen plaŭfrapis la akvon per vosto kaj, saltinte aeren, diris:
 - Dankon!
 - Dankon ne sufiĉos, - memorigis lin Pizo. – Pli bone helpu al ni el ĉi marĉo eliĝi.
 - Volonte, - konsentis Karaseto, - sed vi subakve, kaj mi surakve ne povas naĝadi.
 Remalgajiĝis la amikoj. Subite Pizo saltis, frapis sian kapon per pugno, ke eĉ renversiĝis.
 - Tordu ŝnuron el musko, - diris li al Glano. – Kaj vi, Karaseto, alnaĝigu kelkajn pecetojn da kano.
 Tutan tagon Glano tordis ŝnurojn kaj Rapiduleto, akriĝinte unu brilajeton de Sabalbono, kaj fiksinte ĝin al taŭga tenilo, hakadis el kano akvoskiojn. Kiam ĉio estis farita, la finojn de ŝnuroj ili donis al Karaseto kaj la aliajn – kaptis ili mem.
 - Nun trenu! – kriis Glano. – Tiamaniere vi kaj ankaŭ ni povas vojaĝi.
 Kaj forflugis la amikoj, nur la akvo flanken disiĝadis. Al Glano tia vojaĝado tre plaĉis kaj li tuj ekkreis novajn planojn.
 - Aŭskultu, Pizo, se ni tiamaniere – fajfl.. tra la oceanoj?
 - Kaj Kiel la Fazeolino? – memorigis lin Rapiduleto kaj rapide turninte sin, evitis flosantan branĉon. Glano malfruiĝis kaj devis salti, sed enmaŝiĝis en ŝnurojn kaj plaŭdis en akvon. Karaseto haltis.
 - Kio okazis? – demandis li elakviginte kapon.
 - Nenio! Nur la inko iomete diluiĝis, - ridis Glano kaj rekaptis la ŝnuron.
 Dum sunsubiro, Karaso haŭlis ilin surborden kaj adiaŭis:
 - Feliĉan vojaĝon!
 - Dankon, - kriis la amikoj.
 - Al vi mi devas esti dankinda. Savante min, vi ne hezitis! – plaŭdis li per la vosto kaj malaperis.
 La laciĝintaj amikoj falis teren por dormi. Pro grandega laciĝo kaj feliĉo ili dormegis tutnokte kaj matene vekis, lavis sin kaj ekiris serĉi la Reĝlandon de Faboj.
 - Ne tro bonaj bonfarantoj ni estas, - ekspiris Glano.

- Ĉu vi al mi tion diras? – demandis lin Pizo.

- Ne, al Karaseto, - rezistis Kverkido kaj plirapidigis paŝadon.

Vojaĝinte kelkajn tagojn ili ie kaj alie ekvidis malgrandajn aretojn da infanterianoj kaj kavaleriistoj marŝantaj hejmen post la milito. Komence la amikoj penis eviti ilin, sed observinte, ke ili senatente kuregas tutpotence, ne eltenis kaj haltigis kelke da ili:

- Kial vi tiel rapidas?

- Vi ankaŭ rapidus! Iu liberigis el subterejo la infanteriestron Sabalbonon kaj li nun denove kolektas armeon por marŝo al la Luno. Nun li estras al la kavaleriistoj kaj infanterianoj. Turnu sin malantaŭen, se vi ne volas esti kaptitaj.

Tamen la amikoj ne ektimis. Ili sukcesis elpeti el la fuĝantoj kelkajn ĉevalojn, kelkajn pafilojn, kelkajn sabrojn kaj tute serioze preparis sin liberigi Fazeolinon. Puriginte la armilojn kaj proviziĝinte per manĝaĵo, ili ekjungis la ĉevalojn.

- Kaj kial vi selon metas inverse, profesoro? – neelteninte ekridis Pizo.

- Kaj kiel vi konas en kiun direkton mi rajdos? – rezignis tiu kaj daŭris labori sammaniere. Tamen lokusteto-ĉevaleto sentis, ke lia rajdonto ne estas sufiĉe sperta, do li tiel hufbatis postaĵon de Glano, ke tiu saltis eĉ super agrostidoj.

- Nu, kia gapulo vi estas, - ridis Pizo.- Obstina, kvazaŭ Nukso.

Glano eĉ paliĝis, aŭdinte, kiel amiko lin mokus kaj tre ekkoleris:

- Kiel vi aŭdacas min...

- ... la doktoron de verkado, fanfaronado, fierado kaj aliaj netaŭgaj sciencoj nomi gapulo? – finis anstataŭ li Rapiduleto. –Eĉ mia kapo ekturbiĝis pro viaj tutaj titoloj.

- Ne! – ardiĝis Glano. – Mi deziris diri, kiel vi aŭdacas min, vian amikon, trakti kvazaŭ mi estu nenio.

- Ĉi tie, fraĉjo, jam estas nova kanto. Donu vian manon. – Ili kunpremis kaj skuis siajn polmojn. – Nenio estas farenda, mi estas vilaĝano, mi devis seli, jungi pli ofte ol ia doktoro de sciencoj, do aliaj lernu de mi. Nu, antaŭen! – kriis li al la ĉevalo kaj forkuregis, stariginte sian gajan hartufeton.

Sed ne longe la amikoj tiamaniere rajdis. De sur malgranda monteto ili ekvidis grandegan tendourbon. Tie aŭdiĝis tamburado, bruado de blovinstrumentoj kaj miloj de fazeoloj-infanterianoj marŝadis levante la piedojn super siaj kapoj kaj kantis la kanton, kreitan de Glano:

*Nigrovanga kun ruĝaj punktoj
Sabalbono straba,*

Laŭtgorĝulo Sabalbono -

La sinjor' de faboj.

- Vidu, kiom da bono vi faris al ili, - ofende pikis Pizo kaj montris alidirekten, kie kavaleriistoj hakadis virgetojn kaj per tiaj lancoj pikadis birdtimigilojn.

Malantaŭ ili, levante polvon, rampis helikoj-kirasmaŝinoj. Sur ili sidis fazeoloj-tankistoj kaj kriegis pli forte ol la aliaj.

- Al la Luno! Al la Luno! Vivu komparebla al neniu Sabalbono, la sinjorego de ĉiuj planedoj! – Ili estis partoprenintaj neniun batalon, do ili ege strebis al milito.

- Ne indas por ni dumtage enmiksiĝi en tiun krabraron, - mallevigis la kapon surbrusten Glano.

Sed ankaŭ nokte, eniĝinte en la soldatan tendaron, ili ekvidis la saman bildon. Surgriminte pulvobarelon, lumigita per mil da torĉoj, post sidiĝo en subterejo honoriginta sin per kelkdek ordenoj, Sabalbono faris paroladon:

- Soldatoj, vin atendas krucoj kaj medaloj. Kie vi meritos ilin? Nur en batalo! Pli alte la kapojn, kuraĝuloj! Sur la Luno nin atendas montoj de oro. Se tie estus malbone, mia amiko infanteriestro Sabalbono jam antaŭ longe estus reveninta hejmen. Vivu la amikeco interInfanterianoj kaj kavaleriistoj!

Kie amikoj iris, kien rigardis, ĉie estis same: maljunuloj malpermesadis, maljunuloj ploris, maljunuloj rakontis diversajn teruraĵojn pri milito, kaj junuloj nur ridis kaj filozofiadis:

- Nenion vi komprenas. Sidante ĉe la forno ni ne perlaboros krucojn. Vivu Sabalbono!

Nur en malfrua nokto finiĝis kriegoj kaj marŝado kun torĉoj. La tendourbo por mallonga tempo silentiĝis. Uzante ĉi situon, la amikoj rampis al la loĝejo de Sabalbono kaj ekvidis, ke ĝi estis gardata per duobla ringo de gardantoj. Interne la tendo estis lumigita. Sur bela tapiŝo sidis kelkaj eglanteriidoj kaj diskutis kun la nova militestro:

- Mi diras al vi refoje: tiun doktoron kaj tiun poeton miaj bravaj kavaleriistoj puŝis en la tubon de kanono kaj pafis antaŭ la vento. Diru al Strobilo, ke ili plu ne ekzistas.

- Vi malbone ilin konas, - eksplikadis la eglanteriidoj, - ili estas teruraj krimuloj. Ili kapablas eĉ el la Luno reveni. Vi nur imagu, ili tiel sperte kaŝis la ŝlosilon, ke ĝis ĉi tago ŝia moŝto Pinglino iras alkatenigita al lia moŝto Strobilo.

- Tio estas ege trista, - decidis Sabalbono, - tamen vi ne sidis en subterejo, do vi nenion komprenas. Ĝis revido.

- Tiu kanajlo ne rajtis esti ellasita el tie, - flustris

Glano al Pizo, - en tiu kavo li estus mortinta.

La amikoj silente rampis flanken kaj revenis mlantaŭen. Senvorte ili komprenis unu la alian, ke lukti kun tia forto duope estas tute ne ebla.

Vagante tra la tendaro, la amikoj atingis la malnovan talpfosaĵon. Ĉi tie tage kaj nokte daŭris rekonstruaj laboroj, ĉar dum la ribelo la infanterianoj tiom ĝin detruis, ke el la militlaborejoj postrestis nur teruraj ruinoj. Ĉi tie kelke da plej obstinaj sciencistoj plu blovdadis sapvezikojn kaj penis alkroĉi al ili korbojn, kaj la kreantoj de la sekreta aparato desegnis ion per fingre sur sablo kaj diskutis, ĉu estas ebla aŭ ne eblas forŝeligigi terpomon sen helpo de maŝino. Nome tiuj saĝuloj rakontis, ke tuj antaŭ la ribelo Sabalbon' -

Sabalbonego pelis ĉiujn militkaptitojn al la ĉefurbo kiel kontribucion.

Nenion respondinte, la amikoj elektis la plej vastan kaj la plej piedpremitan vojon kaj kurigis siajn ĉevalojn rapidtrote.

(daŭrigota)



"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

Sub la ĉielarko



Antaŭ nelonge mi renkontis vortojn kiuj ridetigis min.

Jes, oni seriozas pensante ke la mondo jam ne plu ĉirkaŭiras la sunon por rigardi nin, aŭ subite io ŝanĝis nin senkiale.

Kio okazis al mi. Mi estis trinkanta kafon ; ĝi estis eble je la kvara posttagmeze, somere. Ĉu tiumomente kaj plue tiusezone oni ne bezonas trinki ion, ekzemple kafon, almenaŭ por iuj, kiuj ĝin trinkante sentas la guston de la mielo ?



Sophia Loren

En tiuj vortoj mi kredis aŭdi tiujn multajn

La vortojn menciitajn supre iam diris ĝuste la famekonata Sofia Loren. Al apudulo si diris : « Kion vi vidas estas frukto de spagetoj. » Nome, sian korpon kompreneble. Tiaj diraĵoj, diritaj de famekonatuloj, daŭre eĥas, eĉ kiam ĉi tiuj famuloj diras sensencaĵojn kiel ekzemple ĉifoje.

tradukis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

strangulojn kiuj ŝatas la principon : donu sed ne forportu. Mi ne kredas, ke Loren tion signifis. Ĉar kiam eĉ unu suferas, ĉiuj suferas, ĉar ni ĉiuj estas kreitaj el la sama ŝtofo, de la sama patrino, nome : la naturo. Iru demandi al tiuj, silente ellasantaj sian landon pro bombardado !

Kiam la fama verkisto kaj lasta eks-prezidento de Ĉekoslovakio, Václav Havel diris : « Se ĵurnalisto, ie ajn, estas katenita, ni ĉiuj estas katenitaj. » Antaŭ alies suferoj oni ne povas ridi ; kiam oni aŭdas krieton, oni ne povas resti senzorga ; kiam oni aŭdas kriegon, oni ne povas forkuri, kvazaŭ nenio okazas. Mortpafado timigas, eĉ povas mortigi. Ĉia helpo do estus barlumo por kiu marŝas per lambastonoj, por kiu subiĝas alian mondon ol la nia.



Václav Havel

Kiel Loren, ĉiu korpo ne sufiĉas en si mem. Kiam necese oni helpus aliajn per antropologiaĵoj. Sekve pro tiu helpo oni kvazaŭ sentiĝas ombrita de diverskolora ĉielarko, ne fizika kompreneble sed tute spirita. Kutime ĉielarko vidiĝas post pluvado. Feliĉo sekvas turmentojn. Iam mi legis: "Klopodu esti ĉielarko en onies nubo." Kiom malegoisme!

Tiel faris kaj Sofia kaj Vaclav. Ĉu ankaŭ vi ne kopios ilin, kiam necese?

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

19>> Publikigita laŭ propono kaj permeso de Anna Löwenstein

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/%C4%89u-la-unua-scienc-fikcia-libro/>

Homojn proksimigas la amo kaj biero, sed por tiuj aferoj oni bezonas bonan sanon. Tamen ni tutegale sidas en bierejo. Ni cerbumas tie. Profunde kaj enhance. Pri la homo inter homoj. Longe ni pesis la faktojn kaj finfine ni kaptis la veron: la sorto estas kruela. Al unuj ĝi malavaras, sed al aliaj... Kaj iĝas malgaje, kiam la preterirantaj homoj ĵetas al ni:

– Pro kio vi sidas ĉi tie malzorgemaj neglektuloj? Kiujn priridas, sinjoroj? Al falsaj aŭguristoj venos nigraj tagoj! Ĉu vi havas nenion por fari?

Tiu estas instruisto Salomono. Tion saman li demandis ankaŭ hieraŭ. Verŝajne al la homo konfuziĝis la psikologia ekvilibro.

Nia vira interparolo rompiĝis. Ni sidas silente: Post certa tempo ni komencas nervoziĝi, ĉar, kiel multaj homoj, ni ne kapablas silenti. Tial li, Salomono, silente, ke ĉiuj klare aŭdu, diris:

– Esperantistoj venos! Tiam vi ekvidos, kio okazos. – Li frapis per pordo kaj forlasis bierejon. Ni nur ekridis. Tia estas la sorto de nuntempa klerulo.

Unu nokton furiozis ŝtormo kaj matene en arbaro kolektante fungojn la virinoj trovis gazeton, verŝajne alflugitan de vento el la urbo. De malproksime vidiĝis grandaj literoj „Heroldo de Esperanto“. Vekriante la fungokolektantinoj fuĝis el arbaro kaj reveninte kolektiĝis en bierejo. Tie jam sidis tuta vilaĝa elito. La vilaĝestro Vaivada tralegis la strangajn vortojn kaj ial ektemis liaj manoj.

– Kion signifas tio?

La virinoj kuntiriĝis. Nur policisto Kontrimas, kiu el ĉiuj amaskomunikiloj la plej malfidis virinojn, komencis ilin insulti.

– Senhontulinoj! Alportis ĉi tien diversan makulaturon!

La virinoj diskuris. Tamen ĉiuj sentis, ke io estis ne tiel, kiel decas.

– Necesas ekscii, kio okazas en la urbo, – diris vilaĝestro Vaivada. – Ĉu iu scipovas bicikli?

Ĉiuj ekrigardis kun espero la policiston Kontrimas. Tamen tiu kapneis kaj veturi en la urbon kategorie rifuzis. Tiam ekstaris pensiulo Simeono, nervoza, senekvilbra viro kaj trankvile diris:

– Mi vidis, kiel aliaj biciklis.

– Estu singarda. La biciklo estas malnova, – avertis vilaĝestro.

– Mi kraĉu sur ĉion! – respondis Simeono, adiaŭkisis la najbarojn kaj ekbiciklis urben.

Ĉiuj miris, ke post sep diurnoj Simeono revenis, li estis apenaŭ viva. Virojn li trovis en bierejo.

– La impresoj tia, kamaradoj, mi ne dubas, ke la vivo en la urbo furiozas. Kien oni rigardas, ĉie abundas

homoj, vendejoj... Sed kiom da aŭtoj...! Tamen ĉu indas nervoziĝi! – malvarme diris Simeono. – Ne. Dank' al Dio, mi ĉiutage iĝas pli stulta kaj baldaŭ iĝos neimputebla. Do kion mi timu?!

– Sed tiujn...! – ekbalbutis la vilaĝestro Vaivada. – Ĉu vidis vi?

– Ne vidis mi, – respondis Simeono. – Sed apud fervojo la tergrundo jam bruas.

Ĉiuj ektemis kaj alpremiĝis unu al alia. Nur sola Tadeo, batemulo kaj artifikemulo, ĉi printempe atinginta sesdekan jaraĝon, ĉirkaŭrigardis virinojn kaj knabaĉe kriadis:

– Ĉu venos? Nu, kaj kio! Mi tiel frapos...!

Virinoj ruĝiĝis kaj viroj nur nazojn grimacis.

– Iru dormi, flavbekulo! – ekkriis vilaĝestro Vaivada. Tadeo ruĝiĝis kaj foriris hejmen.

Maljunulino Agota trenadis pensiulon Simeonon je basko kaj scivolis:

– Kio estas ili, tiuj esperantistoj? Kiel ili aspektas?

– Oni diras, ke ili estas preskaŭ kiel homoj. Nur havas pli multe da dentoj.

– Sed kiucele ili iru ĉi tien? Kion ili volas de ni? – interesiĝis bestkuracisto Antanas. – Ni havas nenion!

– Virinon vian forprenos, – malgaje diris vilaĝestro Vaivada.

– De kie ili venos? – eknervoziĝis bestkuracisto.

– El urbo!

– Ni pereis! – kriadis virinoj kolektiĝinte al amaso.

– Sed eble ili ne alvenos, – trankviligis la homojn vilaĝestro.

– Mi vidis esperantiston..., – diris studento Rimas.

Iu vekriis. Kelkaj virinoj svenis. Li iomete silentis, ĝuante pri la okazinta efiko, kaj kontenta eltrinkis bokalon da biero.

– En urbo mi kun amikoj vizitadas bierejojn. Unufoje nin preteriris iu viro verdokolora vestita, sur sportĉemizo ĉarmis surskribo „Mi amas Esperanton“, sur ĉapon estis alpinglita granda verda stelo... Tiam mi prenis enmanen...

– Krucon...!, – ekkriis maljunulino Agota.

– Tranĉilon...! – paliĝis policisto Kontrimas.

– Ĉesu vi! – diris studento Rimas, – Kvazaŭ prudenton vi tute perdis pro la timo. La homoj mallevis kapojn kaj studento parolis plu: – Do! Apenaŭ mi prenis la bokalon kaj eltrinkis bieron, esperantisto malaperis. Li iris, preteriris kaj nenio okazis.

La viroj interrigardis kaj, longe nepensante, decidis, ke ekde morgaŭ trinkos pli multe. Tiam neniu kontraŭulo estos terura.

– Propogando! – ekkriis komercisto Staseo,



kolera, sobra viro kun malsana hepato. – Mi ankaŭ vidis esperantiston... antaŭ pli ol dudek jaroj, en la pasinta jarcento. Kalveta, frenezeta, ŝajne frapita li estis, sed je unua rigardo li similis nin. Sin turnadis li, promenadis duontagon ĉe fervojo... Homoj restis sanaj, vivaj. Nur post kelkaj tagoj oni trovis apud fervojstacio verdan ĉapon kun surskribo „Esperanto“ kaj disĵetitajn periodaĵojn en nekonata lingvo. Ne, kamaradoj, ne nervoziĝu ni. Esperantisto estas moderna. Li homojn ne tuŝas... Post tiaj vortoj de komercisto ĉiuj trankviliĝis, eltrinkis po bokalo da biero kaj disiris hejmen. Nur policisto Kontrimas, kiu ne konfidis la ebriigaĵon, eltrinkis du.

Sed apenaŭ suno subiris, ekaŭdiĝis la krio : – „Oni venas!“ . Kaj jen aperis li... Aperis li ĉe la rando de vilaĝo kaj turnis sin al vilaĝa ĉefa strato. En la luna lumo tio estis timiga vidaĵo. Pensiulo Simeono kaŝis sin en fojnejo sub la fojno kaj maljunulino Agota svingis de sur la sojlo per la bildo de Sankta Virgulino kaj kriis:

– Malaperu, malbenita fantomo! For, for!

Tamen terkultivistoj Saŭlo kaj Paŭlo tuj elkuris el vilaĝa domo renkonte kaj ĉirkaŭbrakis tiun homon :

– „Adamo! Frateto!“.

La plej juna fratino Adamon ili ne vidis pli ol dek jarojn. Tiam Adamo strange diris: „Mi iros serĉi feliĉon“ kaj forlasis gepatran hejmon.

– Kie vi pasigis tiujn jarojn? – scivolis Paŭlo.

– En urbo mi estis, en urbo, miaj karaj fratoj. – diris Adamo.

– Kaj kion vi faris tie? – demandis Saŭlo.

– Mi studis en universitato. En urbo mi havas loĝejon, laboron. Tie mi trovis edzinon, havas mi du infanojn, – rakontis Adamo.

– Sekve vi trovis feliĉon, ĉu ne? – scivolis plu Paŭlo.

– Sed esperantistojn, ĉu vidis vi tie? – ne ĉesis Saŭlo. Adamo okulumis fratojn kaj per obtuza, kvazaŭ el la tombo, voĉo diris: „Mi estas esperantisto“. Tiuj du kiel staris, tiel falis surdorsen. Tamen Adamo montris

dentojn, rikanis kaj ekridegis: „Nun estos bone, miaj fratoj!“.

– Ĉu bone?! – timigita diris Paŭlo, kaj Saŭlo retiriĝis surmane kaj piede kaj pro io pardonpetis :

– Pardonu al ni pro ĉio ...

– Kion vi timas? Ĉu esperantistojn? Esperanto ja estas nur lingvo, internacia lingvo. Kaj al tiuj, kiuj ĝin scipovas, malfermiĝas la vojoj al la tuta mondo...

La interparolo rompiĝis. Ili silentis kaj iom poste komencis nervoziĝi. Ili rigardis unuj la aliajn malice.

– Tamen ni nenien volas veturi, ni bezonas nenion, – eklamentis Paŭlo.

– Nia devo postulas gardi niajn naciajn morojn, tradiciojn... la lingvon kaj kredon..., – aldonis Saŭlo.

– Malfermu vi okulojn kaj rigardu al la mondo. Ni montru nin al aliuloj pri kio ni estas interesaj, pri kio ni riĉas! – emocie parolis Adamo. Poste li surmetis la manon sur la ŝultron de Saŭlo.

– Ne ekscitiĝu, fratoj. Ne tiel ĉio estas farata!

– Sed kiel? – demandis Paŭlo. – De kie ni sciu? Saŭlo aŭskultis, cerbumis kaj nenion respondis.

Adamo ĵetis rigardon al fratoj kaj tre serioze diris: “Ni laboru kune...”

La plej juna frato estis prudenta viro. Li perceptis, kio estas justa kaj kio ne. Li faris interkonsentojn kun aliaj landoj, komencis negocon kaj liveradon de agrikulturaj produktoj eksterlanden. La vizioj pri estonteco akiris realan bazon. La vilaĝanoj jam ne plu timis esperantistojn. Najbaroj estimas la fratojn – terkultivistojn kaj tri fratoj jam estis en Afriko, Aŭstralio kaj Antarkto.

Nur oni nenion timu!

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Unue publikigita en „La ondo de Esperanto“, 2021 nr.4, paĝo 100

La plej longa ampoemo en la mondo

En tiu ĉi jaro Slovakio rememoras la 150an datrevenon de la morto de Andrej Sládkovič (1820-1872), kiu okupas apartan kaj specifan lokon inter la slovakaj poetoj. Sládkovič (propranome Andrej Braxatoris) estis slovakia evangelia pastro, elstara poeto de romantikismo, literatura kritikisto, publicisto kaj tradukisto. Lian poezian kreadon inspire influis lia restado en germana urbo Halle, precipe lia konatiĝo kun la poezio de Goethe, Schiller, Puŝkin kaj kun la filozofio de Hegel. Li pere de sia grandioza lirika ampoemo Marína fariĝis konata, respektata kaj ŝatata.

La ĉeftemo de la ampoemo baziĝas sur la granda

verkis kaj sendis Julius Hauser el Slovakio

sed malfeliĉa amo de la poeto al la lernejanino Marína Pischlová, filino de bonstata familio. Li enamiĝis al ŝi en 1839, sed Marína – laŭ peto kaj volo de sia patrino – edziniĝis al riĉa loka marcipanisto. La amo kaj beleco, kiuj estas virtuoze apoteozataj ĉi tie, simbolas tion, kio altigas la homon kaj donas al lia vivo pli altan celon.

La ampoemo, kiu estis publikigita en 1846, konsistas el 2900 versoj. Laŭ literaturaj fakuloj ĝi estas la plej longa ampoemo en la mondo, kaj en aprilo 2017 ĝi estis oficiale registrita kiel monda rekordo ĉe World



Record Academy (Akademio pri mondrekordoj). Ĝia granda forto kuŝas en tio, ke ĝi estas bazita sur realaj faktoj, kaj tiel ĝi estas multe pli forta kaj alloga ol, ekzemple, la fama fikcia tragedio Romeo kaj Julieta. Ĝi estis ankaŭ tradukita dufoje en la hungaran, poste en la ĉeĥan, polan kaj francan. La plej fama kaj plej bela estas la 41-a strofo. Juĝu mem!

*Povas mi seni je via buŝo,
Povas mi seni je l'mano,
Povas mi fori per trista fuĝo,
Povas mi ami kun vano,
Povas mi buŝon soifturmenti,
Povas mi tristi en sola drivo,
Povas mi dezerten min sendi,
Povas ne vivi mi en la vivo,
Povas mi kaŭzi pereon al mi: -
Ne povas mi vin ne ami ! -*

No mirinde do, ke la malfeliĉa amo de la poeto estis ĉefimpulso por la fondo de nuntempa muzeo – Banko de amo, kiu troviĝas en la historia slovak urbo Banská Štiavnica (ĉ. 170 km norde de ĉefubo

Bratislavo) en originala historia domo konstruita en la urbocentro meze de la 16a jarcento. En la domo Marína pasigis la plej grandan parton de sia vivo.


En la muzeo troviĝas ankaŭ trezorejo de amo, kiu estas kreita el la versoj de la ampoemo „Marína”. En la trezorejo estas 100 000 kestoj, kiujn kovras kopioj de la originala manuskripto de la poemo. En ili homoj el la tuta mondo povas konservi simbolojn de la propraj amoj aŭ feliĉo, ekz. fotojn de amatoj, amleterojn, kinejajn biletojn de la unua rendezuo aŭ aliajn personajn amtrezorojn. Pli da informoj haveblas angla-, franca-, germana-, hungara- kaj slovakalingve ĉe <https://bankalasky.sk>.

Sládkovič, malgraŭ la negrandeco de sia verkaro, havas honoran lokon en la historio de la slovak literaturo. Pri liaj agadoj memorigas en Slovakio monumentoj, stratnomoj, nomoj de lernejoj kaj diversaj publikaĵoj. Ankaŭ malgranda asteroido de la asteroida zona, kiun malkovris en oktobro 1980 la ĉeĥa astronomino Zdeňka Vávrová, havas la nomon 4781 Sládkovič.

verkis kaj sendis **Julius Hauser** el Slovakio

Facilaj artikoloj el UEA.FACILA.ORG retejo

Ĉu la unua scienc-fikcia libro?



Lukiano el Samosato (greke Λουκιανὸς ὁ Σαμοσατεύς) estis konata verkisto de satiroj kaj teatraĵoj en la antikva mondo. Li verkis en la greka, sed estis asiriano. Samosato hodiaŭ troviĝas en Turkujo, sed tiam la urbo estis en romana provinco.

Lukiano en la jaro 170 p.K. verkis libron titolitan Veraj Rakontoj, kiu eble estis la unua scienc-fikcia libro de la historio. En tiu libro Lukiano rakontas kiel li vojaĝis al la Luno, jar-centojn antaŭ Kepler kaj Jules Verne.

En tiu ironia libro, Lukiano kaj liaj amikoj per velŝipo vojaĝas tra Mediteraneo. Ili pasas inter la altaĵoj de Ĝibraltaro ĉe la sudo de Eŭropo kaj la nordo de Afriko. Iuj nomas tiun lokon “La Kolonoj de Herkulo”.

Poste, la velŝipo de Lukiano plu-iras al Atlantiko.

Baldaŭ okazas tempesto kaj la ondoj portas la ŝipon supren al la ĉielo. La tempesto daŭras dum sep tagnoktoj kaj finfine, kiam ĝi trankviliĝas, ili atingas insulon: la Lunon! Tie loĝas homoj, kiuj dum longa tempo batalas kontraŭ la loĝantoj de la Suno. Lukiano kaj liaj amikoj rigardas la batalon kaj aŭskultas la rakontojn de la lunanoj. Poste ili revenas al la Tero.

Vi povas aĉeti la du-lingvan libron Veraj rakontoj (en la greka kaj Esperanto) ĉe la reta librovendejo de UEA. La libron tradukis Gerrit Berveling.

Vasil Kadifeli

Pri la verkinto

Vasil Kadifeli estas turka esperantisto kaj eldonanto de la revuo Turka Stelo. Vidu lian sinprezenton en Niaj legantoj.

Novaj vortoj

velo: granda ŝtofaĵo sur ŝipo por kapti la venton.

kolono: alta, rekta parto de konstruaĵo, kutime el ŝtono.

Herkulo: fortega duon-dio, pri kiu la malnovaj grekoj kaj romanoj rakontis tradiciajn rakontojn.

tempesto: malbonega vetero kun forta vento.

>>16



CERBOTONIKO

Baniko revenas de butikumo. Li metas la aĉetaĵojn sur la labortablon. Inter ili estas botelo da cerbotoniko.

Kruko rimarkas tion: Ĉu vi aĉetis novan botelon da tiu cerbotoniko? Vi simple malŝparis vian monon!

Baniko: Kial? Ĉu vi kredas ke ĝi ne efikas?

Kruko: Se ĝi efikus, vi ne aĉetus duan botelon!

SOLECA VERKISTO

Baniko finfine sukcesas ekverki.

Kruko scivolas: Sed pri kio vi verkas?

Baniko: Mi decidis verki biografiecan romanon. Vidu, jen la resumo.

Kruko legas: "Baniko estas sukcesa amoranto, inventisto, esploristo, atleto... Li krozas sur luksa jaĥto kun dudek belulinoj..."

-- Sed vi ne rajtas diri tion. Nenio estas vera.

Baniko: Do? Ja temas pri fikcia romano.

Kruko: Ha! Vi devos klasi ĝin kiel... sciencofikcio!

ĈU VI VERE ESTAS PLI INTELIGENTA?

Eta Tanjo parolas al eta Joĉjo: La knabinoj estas pli inteligentaj ol la knaboj.

Joĉjo: Ĉu?

Tanjo: Ĉu vi ne sciis tion?

Joĉjo: Ne, mi ne sciis.

Tanjo: Jen.

tradukis **Rikardo Cash** el Francio publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com



Krucvortenigmo



1	2	3	4	5
6				
7			8	
9		10		
11				

1	2	3	4	5
6				
7			8	
9		10		
11				

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Severe, pike; 6. ___ tagon !; 7. Komenca sillabo de Odro; 8. G; 9. Estas bemolo aŭ dieso (akuzativo); 11. La sumera diino de seksa amo, fekundeco kaj milito.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Subskribi, monoferi; 2. Leĝaron, ĉifron; 3. Mallongigo de Unuiĝintaj Nacioj; 4. Bonan ___ !; 5. En la helena mitologio nimfo el Troado, filino de rivera dio Kebreno; 10. Simbolo por tantalo je kemio.

Fonto: Semajno de Enigmoj #8
<http://www.semajnodeenigmoj.com>

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Heroa, grandioza; 6. Bonfartus; 7. Nacia domajno de la alta nivelo de Taĝikio; 8. Simbolo por plateno je kemio; 9. Inter martelo kaj amboso; 11. Modere trinkanta kaj manĝanta.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Esti (preterito); 2. Laŭ la greka mitologio, estis dio de la paŝtistoj; 3. Mallongigo de Ontario; 4. Sub (kontraŭo); 5. Kometo estas malgranda ___ korpo; 10. Simbolo por terbio je kemio.

(La solvo troviĝas en paĝo 31)

Protagonismo

"Ekzistado estas ago",
en sanskrito: karmo.
Ni estas neĉefaj roluloj
en teatraĵo, kiu ripetiĝas
eternece, serĉantaj
ĉiam la ĉefan rolon
por bono aŭ malbono.

Ostaĝoj
de l' sortoŝanĝoj
de sinsekvaj vivoj,
ni nur estos liberaj,
kiam ni ĉesos
ami nur tion,
en la aliulo,
kio kuŝas en ni.



verkis **Maria Nazaré Laroca**
el Brazilo

Nigra

En densa mallumo de l'nigra infero
Ekzistis la gento de nigraj diabloj
Kaj koroj iliaj similis al fero -
Sen ĝojo, kompatato, sen amokapablo.

Nur unu malgranda infandiableto
Pri io belega kaj nobla sopiris,
Decidis li pentri ĉielan steleton,
Sed devis unue pentrilon akiri.

Do prenis li pecon da karbo nigrega:
Nenion pli taŭgan sukcesis li trovi.
- Jen estos la stelaj radioj belegaj,-
Admiris verkoton l'aŭtoro senmove.

Kun penoj grandegaj desegnis li stelon,
Sed lumo forestis en nigraj radioj...
Pereis aspiroj, pereis altceloj -
Ne povis li ŝanĝi la nigran medion.

Kaj larmoj ekbrilis en liaj okuloj -
Por eta momento mallumo foriĝis,
Sed larmoj, la steloj de etinferulo,
Gutadis en polvon kaj ... remallumiĝis.



verkis kaj sendis **Antanas Vaitkevičius**
el Litovio

La arbaron kovris ombro

La arbaron kovris ombro
Regas ĝin silenta sombro
Flug' vesperta, striga krio
dume luna antaŭiĝo.

Pasas tempo, nuboj venas
super la arbaro ŝvebas.
Tie mute ĝi atendas:
sur la kampon pluvon ĵetas.

Poste venkas luno nubojn
nigranokten portas lumon
Pli palas dume la luno...
forpelas ĝin fort' de l' suno.

Fabrikkorno, birdosono
ekstariĝu ĉiu homo!
Nokto pasis, jam matenas,
vivas vivo, realvenas!



(Homály borult az erdőre)
-- poemo de Attila József

tradukis kaj sendis **Adri Pázstor**
el Hungario

Mi stelojn jungos...

Mi stelojn jungos al revado,
kaj ili portos min tra bluo
en landon de la nemortado,
de la eterna vivo-ĝuo.

Do, arogantu mia kanto,
do, akresonu mia verso.
Mi estas forto kaj giganto
kaj regontul' de l'universo.

La morto?! Ho, ĝi plu ne tedos,
restinte sole nur simbolo;
je l'universo nur procedos
la menso de l'sciencia volo.



poemo de **Eŭgeno Miĥalski**
Voznesensk, 26 Oktobro 1921

Mesaĝo de Setsuko Yamakawa kaj HORI Jasuo el Japanio

Karaj amikoj,

Aŭskultu kanton "Hejme floras certe sed ..."

Baldaŭ pasos 11 jaroj post la Granda Katastrofo kaj la nuklea akcidento en Fukuŝima, Japanio. La intereso al la nuklea akcidento fariĝas pli kaj pli malgranda en la mondo, kie okazadas diversaj aferoj sinsekve. Tamen la akcidento ankoraŭ ne finiĝis. La detruitaj reaktoroj staradas. Oni ne scias, kiaj estas la fandiĝintaj nukleaĵoj, nek scias, kiel oni povos elpreni ilin, nek scias, kiel oni povos sekure teni la centralon. Ĉiun tagon ekestas 150 tunoj da radioaktiva akvo. Jam konservita estas kvantego da poluita akvo, kiun la kompanio kaj la registaro decidis forĵeti en la maron post du jaroj.

Ni faris Esperanto-version de la kanto "Hejme floras certe sed ..." temantan pri la dezertigitaj urboj, kie same kiel antaŭe floras bele diversaj floroj, kiujn neniu povas ĝui. Ni volas, ke danke al tiu ĉi kanto vi ekhavas denove intereson pri la akcidento.

La kanton kantas famaj esperantistaj duetistoj Kajto (Nederlando). Ni dankas ilin.

"Hejme floras certe sed ..." estas Esperanta versio de la originale japana kanto "Hanaŭa Sakedomo"

<https://www.youtube.com/watch?v=5Vd8owCwSTM> pri homoj forpelitaj de siaj hejmoj pro la akcidento en la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima post la Granda Tertremo en Orienta Japanio en la 11-a de marto 2011.

La muzikgrupo Kageboushi (Esperante: Silueto) poemverkis, komponis kaj komencis kanti la kanton en 2013. Baldaŭ pasos 11 jaroj de post la akcidento, sed restas homoj, kiuj ankoraŭ ne povas reveni kaj loĝi en sia hejmloko, ĝuste kiel ĝi prikantas. Ni ne forgesu la nuklean katastrofon de Fukuŝima.

Kantas nun nederlanda duo Kajto en Esperanto.

<https://youtu.be/FI04twFzxA>

Jen la versio de muzikgrupo AnySees:

https://www.youtube.com/watch?v=GxzeC2_ars0

Kaj la versio de Jomo

<https://www.youtube.com/watch?v=cAMgZ5VEPyc>

Bonvolu diskonigi la kanton al homoj ĉirkaŭ vi.



ĈIELA VORDINISI: LA UNUAJ VOĈOJ, LA UNUA KOMUNUMO (3)

Post multaj militoj de la geometriaj formoj, post la formado de la unuaj lumkorpaj gasiĝemaj estaĵoj, komencis formiĝi la unuaj vordonisianoj.

La unua Vordonisi-substanco aperis en la akvoj baldaŭ post kiam la ĉiellafo malvarmiĝis kaj formis la montojn kaj rokojn. Ĝi estis granda glueca guto. La akvoj, en kiuj ĝi troviĝis, estis tiuj unuaj ĉielaj akvoj, kiuj pluvis el la universo. Ĝi havis malsimilan koloron ol tiuj de la hodiaŭaj akvoj, kaj ili estis bolantaj. Jen, el tiu unua substanco, aperis tri apartaj etendaĵoj, kiel rubandoj, kun neimageblaj koloroj por la hodiaŭo.

El unu de ili devenis plantoj kaj fruktoj, bestoj devenis el unu alia, kaj tiuj unuaj Vordonisianoj, la gigantaj estaĵoj devenis el la tria. Ili dividiĝis en inajn kaj virajn seksojn pli poste. En la komenco, ĉiuj de tiuj gigantoj estis unu-seksaj. La unua sono, kiun ili eligis sur la Ĉiela Vordonisi kaj en la spaco estis: "Vord, Vord, Vord"... La unuaj akvaj plantoj diris responde: "Niss, Niss, Niss...". Tiuj estis la unuaj konataj sonoj kaj vortoj de la prapatroj de Vordonisianoj. Kaj jen kiel

verkis kaj sendis Konural Sunal el Turkio

tio devenis de ilia unua patrujo, ĉi tiu planedo, kaj fariĝis la nomo de ĉi tiu civilizacio.

Tiuj ĉi sonoj resonis en la ĉirkaŭj steloj parseko po parseko. La sonoj de gigantoj, de akvaj plantoj kaj de bestoj formis ilian lingvon. Vortoj de du silaboj, de tri silaboj kaj iom post iom dek kvin silabaj vortoj elverŝiĝis el iliaj buŝoj. Neniu el la lingvoj, kiuj formiĝis en la galaksio kaj pli poste en nia mondo, estis tiel riĉa. Kiam giganto eldiris vorton, ĝi havis signifon, kiu samtempe inkludis tion, kio okazis en la pasinteco kaj tion, kio povus okazi en la estonteco. La hodiaŭa homa inteligenteco, blokita en malvirtaj kaj logikaj ŝablonoj, ne povas kompreni ĉi tion. La unuaj sonoj estis ne nur silabaj kunmetaĵoj elirantaj el la buŝoj de gigantoj, sed ankaŭ sonoj faritaj per la aĵoj kun kiuj ili ludis. Malmultaj el ili povas esti imagitaj hodiaŭ.

Ĉiela Vordonisi estis ludplanedo, kaj plej multaj aferoj naskiĝis el la ludoj. SUTLABI estis la unua bela





kaj ĉarma giganto kaj estis la dio pri amuzado kaj ludoj adorata de ĉiuj generacioj en Vordonisi. Ekzistis neniu sankta libro en la Ĉiela Vordonisi. Kiam venis la tempo, distraĵoj estis okazigitaj por ĉiu giganto englutita de nigraj truoj. Ili ne igis morton kompatinda tiel, kiel la homiĝantaj estaĵoj sur la Tera Vordonisi faris. La nigra truo ne estis io timinda, ĝi estis alia dimensio.

Post pluraj generacioj la gigantoj iĝis pli malaltaj en staturo kaj dividiĝis en du seksojn. Naskiĝis la fenomeno nomata amo. Sed ne ekestis ĵaluzo. Ĝi estis vera universala amo en la spaco. Multe pli poste, la Profundaj Vordonisianoj daŭre serĉis tion. Tiu ĉi amo ne skribigus poezion, ĝi ne konis romantikismon, ĉar ĝi mem estis poezio. Ĝi estis kiel pulvora sukero flosanta en la spaco kaj feliĉiganta vin kiam ĝi trafis viajn lipojn. La amvortoj de Teraj Vordonisianoj, post multaj parsekoj, ĉiam naskiĝis el ĉi tiu esenco.

Ĉiela Vordonisi, kiu palpebrumas al ni el la mallumo de la universo, vi vivas en niaj vejnoj. Ni havas viajn ombrojn en nia lingvo, en nia amo...

verkis kaj sendis **Konural Sunal**
el Turkio
POETO DE VORDONISI

EKRA2021 - Poezio - NES-018

-- konkursaĵoj de EKRA 2021 - Razgrad

ĈIU EN LA SPITO

En la spito al mi mem,
kaj ankaŭ vi,
Mi lasas ne dirita
kion mi sentas.

Mi rigardas la verdan stelon
tutnokte,
ĝi lumas,
kaj ĝi estingiĝas ĝuste antaŭ tagiĝo,
por ke kaŝas tion, kion mi scias,
kion mi sentas
kaj kion vi sentas.

Ankaŭ vi estas ĉi tie
kaj vi rigardas
ĉu li verkos ion,
el kiuj la koro tremas
aŭ nur,
simple,
OK. (BONE).

NUR POR ŜI

Kiel densa aŭtuna nebulo,
Via vizaĝo flagras antaŭ miaj okuloj
Kaj en la mia kapo ekbruis
Cent tamburoj.

Mi daŭre serĉis vin,
kiel kudrilo en fojnamaso,
Mi frotas revajn okulojn,
kaj vizaĝoj konataj kaj nekonataj pasas.

Ĉiuj aliaj estas tie,
kaj ne kaŝas ŝiajn sopirojn,
dezirojn,
sed miaj okuloj rigardas malproksimen.

Mi etendis miajn manojn,
Mi tuŝis viajn harojn,
ondo de graco inundas la korpon,
kaj la kiso restis longa, longa ... sur via kolo.

NES-018

NES-018

poezio de **Nebojsa Stankovic** el Serbio
Instiga premio pri poezio

Viro mortis, kaj post lia morto neniu prizorgis lian nigran hundon. La hundo longe kaj amare funebriis pri li. Ĝi tamen ne kuŝiĝis por morti sur la tombo de sia mastro, eble pro tio ke ĝi ne sciis kie tiu troviĝas, eble ankaŭ pro tio ke ĝi esence estis hundo juna kaj gaja, kiu ankoraŭ ŝajnis havi konton por reguligi kun la vivo.

Troviĝas hundoj duspecaj: tiaj kun mastro, kaj tiaj sen mastro. Laŭ la eksteraĵo tiu distingo ne gravas; senmastra hundo povas esti same grasa kiel la aliaj, ofte eĉ pli grasa. Ne, la diferenco troviĝas aliloke. Por hundo la homo signifas eternon, providencon. Mastron obei, sekvi, fidi: jen por tiel diri la senco de hunda vivo. Estas vere, ke ĝi ne dum ĉiu minuto de la tago pensas pri sia mastro, kaj ke ĝi ne ĉiam akompanas lin ĉekalkane; ne, ĝi ofte vagas tute sola kun afereca mieno dum ĝi priflaras domangulojn, ligas rilatojn kun siaj samspeculoj kaj kaptas oston, se tiel eblas, kaj zorgas pri multo; tamen en la momento kiam ĝia mastro fajfas, ĉio ĉi malaperas el ĝia hunda cerbo pli rapide ol kiel skurĝaj batoj elpelis la vendistojn el la templo; ĉar ĝi scias, ke unu afero estas necesa. Kaj ĝi forgesas sian domangulon kaj sian oston kaj siajn kompanojn kaj rapidas al sia mastro.

Tiu hundo, kies mastro mortis en maniero kiun la hundo ne sciis, kaj estis entombigita en loko kiun la hundo ne konis, dumlonge funebriis pri li; sed kiam pasis tagoj kaj nenio okazis, kio povus memori ĝin pri la mastro, ĝi forgesis lin. En tiu strato, kie ĝia mastro iam loĝis, ĝi ne plu flaris la odoron de liaj spuroj. Kiam ĝi ludis sur herbejo kun amiko, ofte fajfo tranĉis la aeron, kaj sammomente la amiko malaperis kiel vento. Tiam ĝi streĉis la orelojn, sed neniu fajfo similis tiun de ĝia mastro. Do ĝi forgesis lin, kaj ĝi forgesis ankoraŭ ion: ĝi forgesis ke ĝi iam havis mastron. Ĝi forgesis, ke iam ajn estis tempo, kiam ĝi ne konsiderus ebla por hundo vivi sen mastro. Ĝi iĝis hundo pri kiu direblus, ke ĝiaj bonaj tagoj forpasis, kvankam nur en senco interna, ĉar pri mondaĵoj ĝi sufiĉe prosperis. Ĝi vivis tiel, kiel hundo povas vivi: ĝi fojfoje ŝtelis bonan tagmanĝon sur la vendoplaco kaj ricevis bastonadon, kaj havis amaferojn, kaj kuŝiĝis por dormi kiam ĝi laciĝis. Ĝi akiris amikojn kaj malamikojn. Lutage ĝi zorge ta-nis la haŭton de hundo pli malforta, alitage ĝi mem estis grave taŭzita de alia, pli forta. Frumatene oni povis vidi ĝin kuri malsupren laŭ la strato de sia mastro, kie ĝi pro kutimo ankoraŭ plej ofte restadis. Ĝi kuras rekte antaŭen kun mieno kvazaŭ ĝi havus ion gravan por plenumi; pasante priflaras hundon renkontatan, sed ne zorgas daŭrigi la konatiĝon; poste ĝi rapidiĝas, sed subite sidiĝas por grati sin malantaŭ

orelo kun flamiĝanta energio. En la sekva momento ĝi eksaltas kaj flugas trans la straton por peli ruĝan katon tra kela truo, post kio ĝi kun rekonkerita mieno afereca pluiras sian vojon kaj malaperas post domangulo.

Tiel pasis ĝia tago, kaj jaro proksime spursekvis jaron, kaj ĝi maljuniĝis sen tion rimarki.

Poste do alvenis vespero nuba. Estis humide kaj malvarme, kaj iam-tiam ekpluvis. La maljuna hundo dum tuta tago vagadis longe for en la urbo; ĝi malrapide supreniris la straton, ĝi iomete lamis; foj-foje ĝi haltis por skuégi sian nigran felon, kiu kun la jaroj grizmiksiĝis ĉirkaŭ la kapo kaj kolo. Laŭ sia kutimo ĝi flaris jen dekstre, jen maldekstre; poste ĝi deviis sub pordegan volbon, kaj kiam ĝi revenis el tiu, alia hundo ĝin akompanis. Sekvamomente aperis ankaŭ tria. Ili estis hundoj junaj kaj ŝercemaj, kaj ili volis logi ĝin al ludado; sed ĝi estis malbonhumora, kaj krome komenciĝis pluvego. Tiam fajfo tranĉis la aeron, longa kaj akra fajfo. La maljuna hundo rigardis la du junajn, sed ili ne atentis; fajfis neniu el iliaj mastroj. Tiam la maljuna senmastra hundo streĉis la orelojn; ĝi subite sentis sin tre stranga. Jen ankoraŭ fajfo, kaj la maljuna hundo perplekse saltis jen unuflanken jen aliflanken. Fajfas ĝia mastro, tiam ĝi ja devas obei! Triafoje iu fajfis, same persiste kaj akre. Kie li do estas, kiudirekte? Kiel tio okazis, ke mi disiĝis de mia mastro? Kaj de kiam ni disiĝis, de hieraŭ aŭ de tri tagoj aŭ eble de momento? Kaj kiel aspektis mia mastro, kaj kian odoron li havis, kaj kie li estas, kie li estas? Ĝi kuris en rondo priflarante ĉiujn preterpasantojn, sed neniu estis ĝia mastro, kaj neniu volis esti tia. Tiam ĝi turnis sin kaj kuris malsupren laŭ la strato; ĉe domangulo ĝi haltis por rigardi ĉirkaŭen ĉiudirekte. Ĝia mastro ne estis tie. Tiam ĝi galope rekuris laŭ la strato; koto ŝprucis de ĝi kaj pluvakvo fluis de ĝia felo. Ĉiungule ĝi haltis, sed nenie troviĝis ĝia mastro. Tiam ĝi sidiĝis en stratkruciĝo, streĉis sian hirtan kapon al la ĉielo kaj hurlis.

Ĉu vi iam vidis, ĉu vi iam aŭdis tian hundon forgesitan, senmastran, kiu streĉas sian kolon al la ĉielo kaj hurlas, hur-las? La aliaj hundoj malrapide fortrotas kun la vosto inter la kruoj; ja ili ne povas konsoli nek helpi.

el la sveda tradukis **Sten Johansson**

Fonto: LA KISO kaj dek tri aliaj noveloj

10. PRINTEMPO

La Vintro foriras kaj Kato sportemulo iras promenadi inter la florantaj Fukinotooj – manĝeblaj burĝonoj.

- Kato, kien vi iras? – demandis la turisto.

- Ho, mi promenadas! La vetero estas bela kaj oni ne devas sidi hejme.

- Verŝajne via sako estas jam plena?

- Kompreneble, post la vintra tempo la verdaĵoj estas necesaj kaj la Printempo ne estas avarulo.



11. RUĜKAPAJ GRUOJ

La grupoj venas... La Kato strange rigardas kun taso enmane.

La grupoj estas soifaj post la longa flugado. Iu el ili demandis:

- Kato, kio estas en via taso? Ĉu akvo? Ĉu vi donos al mi malmulte, ke mi trinku?

- Nun nenio! Vi serĉu aliloke!...


- Kato, pensu malmulte, se vi estas soifa kaj iu ne helpas al vi? Kiel vi vin sentos? – diris ĝi.



12. ANTAŬ LA DOLĈAJĜEJO

Katoj ĉe la kukejo "Esperansa" La servisto, kiu donis al ili la dolĉaĵojn:

- Karaj, la dolĉaĵoj estas bongustaj, sed estas danĝero. Multe da homoj malsaniĝas de diabeto, malbona malsano. Mi ne estas certa, sed eble ankaŭ kaj la bestoj malsaniĝas. Gardu vin de la dolĉaĵoj, mi vin petas!... Ne estu frandemuloj!



(daŭrigota)

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario,

la bildojn desegnis **Hori Jasuo** el Japanio



Kulpo

rakonto de Ivaniĉka Maĝarova el Razgrad, Bulgario

La sekvontan tagon, post ĉiu skandalo kaj lastatempe, batado, li alportis al ŝi florojn, foje multekostajn donacojn. Li petegis Elgan pardoni lin kaj promesis, ke tio ne plu okazos. Orlin, ilia filo, jam estis en la lernejo kiam li unue batis ŝin. Komence ŝi sukcesis kaŝi tion de li, sed lastatempe la infano estiĝis pli kaj pli atestanto de tiuj malbelaj, humiligaj scenoj por sia patrino. Orlin provis protekti ŝin, sed tio pli kolerigis lian patron. Kaj tiel dum preskaŭ du jaroj.

Li revenis de renkontiĝo kun amikoj sufiĉe ebria, preskaŭ matene. Li ŝaltis la magnetofonon ĝis la limo, kaj falis en la brakseĝon. Li kunkantis ebria kun kantistino.

Elga vekigis timigita de la laŭta sono. Ŝi ĵetis sian hejman robon sur siaj ŝultroj kaj eniris la salonon. Ŝi atendis lin ĝis noktomezo, sed poste enlitiĝis. Orlin dormis en la infanĉambro. Ŝi havis malfacilan tagon. Multaj urĝaj taskoj en la oficejo, kiujn oni ne povis prokrasti. Kaj ili kverelis matene. Ŝi ne povis forlasi la oficejon, do ŝi petis lin iri al la gepatra - instruista

kunveno. Li rifuzis la proponon pro tio, ke tio estas la devo de la patrino kaj ŝi ne transdonu ĝin al li. Tio jam estas tro. Ŝi pagis la fakturojn de elektro, akvo kaj hejtado. Ŝi repagis la prunton por la apartamento, prizorgis la domon, pri tio, ke ĉio estu enorde, ĉar li kutimis ĉe siaj gepatroj, ke lia patrino prizorgas la purecon kaj komforton de la hejmo. Jes, sed ŝi ne laboras kaj neniam multe laboris. Ŝi okupiĝis nur pri sociaj agadoj. Elga ankaŭ englutis tion. Sed tre dolorigis ŝin, kiam li diris al ŝi, ke ŝi ankaŭ ne kapablas kuiri. Ili komencis aĉeti manĝaĵojn el apuda restoracio, kaj foje ili vespermanĝis tie. Sed lastatempe, malpli kaj malpli. Ili estis bonfinance, eĉ tre bone. Li laboris en kultura instituto kiel krea laboristo kaj perlaboris solidan porvivaĵon. Kaj ŝia salajro estis alta.

Ankoraŭ dormante, Elga etendis la manon kaj malŝaltis la magnetofonon.

"Orlin dormas, vi vekos lin. Kioma horo estas! Kie vi estis ĝis nun? Kaj la najbaroj, kion ili pripensos?"

Li malfacile leviĝis el la fotelo kaj balanciĝis iri al



la muziksistemo. Li reŝaltis ĝin sen diri eĉ unu vorton. Ŝi denove malŝaltis ĝin.

"Ne... nervozigu min! Mi estas en mia loĝejo kaj mi faros tion, kion mi volas." Li komencis kunkanti kun kantisto denove per sia voĉo, raŭkiĝinta pro alkoholo kaj multe pli laŭte ol antaŭe.

Elga fiksrigardis, ne sciante kion fari. Ĉu ŝi ploru aŭ ĉu ŝi ankaŭ krii. Ŝi ektimis, kiam vidis Orlin tremantan en la piĝamo ĉe la pordo de la infanĉambro. Ŝi rapide rekonsciiĝis, brakumis ĝin, eniris la ĉambron kun la filo kaj ŝlosis la pordon de interne. La instalaĵo daŭris pleniĝi la salonon, kaj la voĉo de la kantistino bonvole kovris la meblojn, murojn kaj plankon.

Ŝi ne dormis ĝis la mateno. Kiam Elga eliris, li ankoraŭ dormis kaj de la instalaĵo aŭdiĝis monotona fajfado.

Ŝi iris en la banĉambron, kaj rigardis sin en la spegulon. De tie timigitaj okuloj rigardis ŝin, timante pri tio, kio okazas.

Ŝi sciis, ke Vihren havis problemojn en sia laboro lastatempe, sed li ne kundividis ilin kun ŝi. Kiam ŝi demandis lin, li diris, ke ĉio estos enorde. Li komencis malfruiĝi kaj reveni iomete ebria, sed li tuj enlitiĝis kaj ne kaŭzis al ŝi problemojn. Kiam ŝi petis lin kundividi, li respondis, ke li mem kapablas solvi problemojn.

Ŝi demandis liajn kolegojn, sed ili trankviligis ŝin, ke estas nenio malbona ke li malŝarĝas de tempo al tempo. La streso ĉe ili estas granda kaj li bezonas malŝarĝon. Kia pli bona medikamento ol taso, du bela, malmola alkoholaĵo. Li estas forta viro kaj li sukcesos. Tio ĉi pasos.

Sed tio ne okazis. Ili iĝis konstantaj amikoj kun alkoholo. Li trovis amikojn por kompanio. Pli kaj pli ofte li revenis ebria. Li faris skandalojn kaj atakis ŝin se ŝi kontraŭis. Li ŝajne deziris ĝin. Orlin ofte atestis tiujn malbelajn scenojn. Ŝi provis protekti lin, ŝi estis ofendita, doloranta kaj maltrankviliĝis, ke ŝia filo ekmalamos sian patron. Ŝi ne sciis kion fari. Elga ne volis diri al siaj gepatroj. Ili ne tre konsentis kun ĉi tiu geedziĝo. La kialon ŝi ne komprenis. Ŝi decidis kundividi kun lia patrino, sed ĉi tie ŝi renkontis ŝian firman opinion, ke Vihren ne povus esti alkoholulo kaj neniam farus tion, se li ne estus provokita. Resume, lia patrino nerekte akuzis ŝin, ke ŝi ne estas bona edzino, kaj anstataŭ karesi lin, ŝi repuŝis lin. Ŝi ne diris al la bopatrino, ke li batas ŝin. Kaj la batadoj okazis pro aŭ sen kialo. Ŝi ankaŭ ne kuraĝis kundividi tion kun siaj amikinoj. Ŝi renkontis la viron de sia vivo. Edukita, bela, bone gajnanta, MAĈO! Ĉiuj enviis ŝin. Kiel diri al ili la veron kaj kiel ili povus helpi ŝin. La honto forte pezis al ŝi. Ŝi kutimis senti sin kulpa pro tio, kio okazis. Ja, la virino estas la spino de la familio. Ŝi kreas komforton, ŝi estas tiu, kiu kunigas kaj ĉirkaŭbrakas

per amo ĉiujn. Krom la vundoj sur ŝia korpo, ĉi tiu vundo en ŝia koro estis la plej terura, la plej profunda, vundo, kiu ne povis saniĝi. Ŝi fermiĝis, iris preskaŭ nenien, ne renkontis amikojn. Sed ŝia plej granda doloro kaj timo estis Orlin. Li ofte atestis skandalojn kaj batojn. Kaj ili fariĝis pli oftaj. Preskaŭ ne estis loko sur ŝia korpo, kie ne videblas spuroj de lia pugno. Kaj la sekvan tagon denove floroj, donacoj, promesoj, kiujn li neniam plenumis.

Orlin kreskis, atestante ĉion ĉi. Li petegis sian patrino foriri, translokiĝi aŭ iri kaj vivi al ŝiaj gepatroj. Ŝi estis la nura filino. Sed ŝi trankviligis lin, ke lia patro solvos sian problemon kaj ke ili denove estos feliĉa familio. Kaj ŝi petegis Orlin-on, ke li diru al neni. Orlin iziolis sin, malbonigis sian sukceson, ne renkontis siajn amikojn.

Li pensis ke devos fari ion. Ĉu Informu la policon? Sed kia honto estus por ŝi kaj por li. Ŝi ankoraŭ amis la edzon, strange, sed ŝi ankoraŭ kredis, ke ili denove havos bonan familion, ke Vihren estos bona edzo kaj patro.

lun posttagmezon, kiam ŝi estis revenanta de la laboro kaj eniris en la grandan vendejon por aĉeti produktojn, ŝi renkontis lian koleginon.

"Ho, Elga, kiel vi fartas? Ni ne vidis unu la alian dum longa tempo. Kiel vi fartas, ĉu vi fartas bone?"

"Nu dankon!"

"En kiu klaso estas Orlin jam?"

"En la sesa."

"Ĉu Vihren trovis laboron?"

"Kian laboron?" - Elga demandis surprizite kaj embarasite de la demando kaj tuj decidis, ke li verŝajne serĉas kromlaboron. Lastatempe, ŝi konstatis, ke pli kaj pli ofte li prenis monon de ilia komuna konto, tamen ne financis ĝin per novaj monsumoj.

"Li estis eksigita" aŭdis la voĉon de lia kolegino.

Elga fiksrigardis sian interparolanton, ne povante eldiri eĉ vorton. Ŝi sentis, ke ŝiaj kruroj malfortiĝas, kaj etendis la manon, kvazaŭ serĉante subtenon. Ŝi rapide adiaŭis kaj marŝis al la tramhaltejo kun pezaj kruroj.

Ŝi trovis Vihren hejme. Li revenis nekutime frue.

Ŝi metis siajn sakojn sur la teron, demetis sian jakon kaj ekstaris meze de la salono.

"Kial oni maldungis vin?"

Li silentis, kuŝante sur la kanapo, kaj levis la kapon. Liaj ruĝiĝintaj, ŝvelintaj okuloj estis indiko, ke li estis ebria denove.

"Mi demandas vin." Kial oni maldungis vin?

Plena silento. Kaj malestima rigardo al Elga.

La enirpordo malfermiĝis, kaj post momento Orlin eniris la ĉambron.

"Ho, venas via defendanto, du kontraŭ unu."

"Kio okazas," preskaŭ kriegis Orlin.

Elga provis mildigi la streĉiĝon, sed ŝajne la ŝtormo alproksimiĝis.

"Kio? Via patrino denove min ĉikanas. Mi neniam per io kontentigis ŝin." - Vihren ridegis histerie.

"Ne ofendu mian patrino! Rigardu kiel vi denove aspektas?"

"Kiel, ĉu vi rajtas diri tiel al mi? For, for de ĉi tie!"

"Ne ni, sed vi, ebrulo, foriros!"

"Kion vi diris?" - La voĉo de Vihren jam estis minaca.

"Kion mi vidas, tion mi diris."

"Kion ???"

"Mi ne timas vin, kaj mi diros al vi, ke vi estas ebrulo, ke vi turmentas mian patrino, ke vi zorgas pri nenio krom drinkado kaj skandalo. Tio estas ĉio!"

La vortoj de Orlin, kiel kugloj, pafis lian patron. Li estis ege kolera. Li ekstaris kaj levis sian pugnon al Orlin. Elga kriegis kaj rapidis por protekti sian filon. Ŝi malfruis. La mano de la batemulo trafis ŝian vizaĝon anstataŭ tiun de Orlin. Sekvis novaj batoj sur ŝia brusto. Ŝi falis teren. Li piedbatis ŝin. La brakoj de la viro ĉirkaŭvolvis ŝian kolon. Li komencis sufoki ŝin. Elga apenaŭ povis spiri. Tiam, tiam okazis la terura afero. La granda kuireja tranĉilo ekbrilis en la manoj de Orlin kaj enbatis lian patron sekundojn poste. Ĝi restis

tie. La infano frostiĝis dum sekundoj antaŭ la kadavro, kiu falis sur lian patrino, poste elkuris el la ĉambro. La sango fluis kaj ruĝe makulis la tapiŝon. Elga kuŝis sub la senviva korpo de sia edzo, senhelpa kaj timigita. Ŝi jam estis surverŝigita de sango. Per unu lasta plifortigo, ŝi stariĝis kaj estis terurigita de tio, kio okazis, vokis Orlin. Neniu respondis al ŝi. Per nekredibla klopodo ŝi apenaŭ povis iri al la telefono en la koridoro. Ŝiaj manoj tremis kaj ŝi ne povis elekti ambulancon. Ĝi estis okupata kaj Elga telefonis denove. Oni respondis. Per sekaj lipoj ŝi diktis la adreson.

"Ni estos ĉe vi post kelkaj minutoj," diris la deĵoranto.

Ŝi sidiĝis kaj atendis. La sango daŭre ŝprucis.

La kuracistoj venis rapide. Ili nur deklaris la tempon de morto kaj la daton. La polico... Ŝi provis, sed ne povis erarigi ilin. Orlin malaperis. Li ankaŭ ne venis al la entombigo. Kvin tagojn poste, ŝi trovis lin volvita sur la kanapo en la subtegmento.

verkis kaj sendis **Ivaniĉka Maĝarova**,
el Razgrad, Bulgario

Benzinkamiono

La urbeto, kiu estis varmigita troe pro la aŭgusta varmego, rekonsciĝis pro la bruego tagmeze. Ĉiuj en la domoj, kafejo, najbarejo, kampoj, vinberejoj, ĝardenoj, riverbordo, moskeo ktp aŭdis la sonon. Dum homoj kverelis pri la fonto de la bruego; la infanoj jam atingis la scenejon, kaj ili revenis al la urbeto kriante:



"Renversiĝis veturilo... Ne veturilo, sed kamiono renversiĝis... Ne kamiono, sed ŝarĝaŭto... Ĉu ŝarĝaŭto? Oni nomas ĝin benzinkamiono... Ne, aviadilo falis, aviadilo... Io elfluas el la benzinkamiono... Akvo elfluas ... Oleo ekfluas... Ne, benzino ekfluas... Kiel vi scias, ke ĝi estas benzino?... Pro laodoro... Mi ĵuras... Mi ĵuras kaj ĵuras... Ne diru sensencaĵojn... Mi ne diras sensencaĵojn..."

rakonto de Ruhşen Doĝan Nar el Turkio

La urbetanoj, kiuj jam vekigis el sia tagmeza dormado pro la bruoj, ekstaris tuj kiam ili aŭdis, ke benzinkamiono renversiĝis. Ili kaptis kiajn ajn ujon, sitelon, vazojn, vazeton, skatlon, kiun ili trovis, kaj ekkuris al la loko de la akcidento.



Ĉiuj urbetanoj, de la aĝo sep ĝis sepdek, kuris kvazaŭ en olimpika turniro, ĉiuj, viroj, virinoj kaj infanoj. De avoj kun unu piedo en la tombo, kiuj apenaŭ povis marŝi kun bastono, ĝis beboj lernantaj marŝi. Ĉiuj kuris senspire.

La sesdekjara ŝoforo de la benzinkamiono havis koratakon pro la varmego. La kamiono, kiu eliris el la vojo kaj renversiĝis, post du transkapiĝoj estis trenita kaj haltis meze de kampo en la flanko de la vojo kaj fendiĝis pro la saltoj. Tra la fendo elfluis benzino. La ŝoforo elfetiĝis de la antaŭa vitrofenestro ĉar li ne portis sian sekurzono kaj mortis surloke.

La unuaj, kiuj atingis la benzinkamionon, estis tre bonŝancaj. Ili plenigis siajn ujojn kaj sitelojn sen homoj amasigis la lokon. Ili kuris reen al siaj domoj por malplenigi la ujojn kaj reveni por replenigi ilin.

Malpli ol dek minutojn post la akcidento, la ĉirkaŭo de la benzinkamiono popolamasiĝis. Neniu pensis pri la situacio de la ŝoforo. La imamo, kiu atingis la scenejon, unue iris trovi la ŝoforon. Kiam li konstatis

ke li estis morta, li preĝetis kaj tuj enmiksiĝis en la popolamaso.

Ĉar ne ekzistas vickulturo eĉ en la grandaj urboj, eĉ inter la plej kleraj homoj, estis absurde pensi, ke duonkleraj homoj enviciĝus en urbetoj. Tial estis batalo, tumulto, kverelo, diboĉo ĉirkaŭ la benzinkamiono. Ne zorgu demandi pri kio!

Ĉu vi volas virinojn batalantajn kap-al-kape, virojn piedfrapantajn kaj vangofrapantajn unu la alian, avoj profitantaj la ŝancon kaj molestantajn virinojn, junuloj batalantaj ŝirmite per benzino, aŭ infanojn malbenantajn unu la alian? Je unu momento, la blinda Ibrahim grimpis sur la supron de la benzinkamiono kun la helpo de siaj du filoj. Li kriis kiel eble plej laŭte: "Kampanoj! Nur aŭskultu min. Haltu la kverelon. Atendu... Aŭskultu min. Gesinjoroj, ĉar la benzinkamiono nun estas en mia kampo, kiel vi vidas, ankaŭ la benzino apartenas al mi. Ĉiuj tuj forlasu mian kampon. Foriru el mia propraĵo. Eku! Sed antaŭ vi foriros malplenigu viajn ujojn!"

"For hundo!" iu diris, ĵetante la unuan ŝtonon. La ŝtono vundis la brovon de la blinda okulo de Ibrahim. Ibrahim apenaŭ eskapis la pluvon de ŝtonoj elsaltante el sur la benzinkamiono. La tumulto daŭris de kie ĝi ĉesis.

Ĉi-foje, la imamo grimpis sur la benzinkamiono pere de ununura forto. Li ekparolis kvazaŭ li estis predikanta: "Ho islama komunumo, je Dio, ne faru tion! Jen tio estas peko! Ĝi estas malobservo de la rajtoj de aliaj! Tio, kion vi faras, estas formanĝi la rajton de servantoj de Dio! La puno en la alia mondo estis tre, tre granda, neniu de vi povos trakti ĝin! Se vi iros al la alia mondo sen ricevi konsenton de la posedanto de la benzinkamiono, vi returnos de la pordego de la paradizo... Se la posedanto ne donos konsenton, en la postmorta mondo, la pordego de la paradizo fermiĝos sur via vizaĝo! Kaj por kio? por nur unu ujo de benzino! Ne faru tion, ni reiru al nia urbeto!"

Neniu zorgis pri li... La interbatalado komenciĝis denove. La urbetestro pensis iomete pri "ĉu mi surgrimpu sur la kamionon?", sed li ne kuraĝis je tio.

Dume neniu alvokis la ĝendarmon aŭ ambulanco. Kiam la ŝoforo de unu el la preterpasantaj aŭtoj komatiĝis pro la okazajo kaj alvokis la numeron 112, la aŭtoritatuloj eksciis pri la akcidento.

Unue venis la ĝendarmaro, poste la ambulanco. La ĝendarmaro provis forpeli la urbetanojn for de la benzinkamiono; sed malsukcesis. Ili ĉiuj estis nur dek soldatoj. Kiam la ĝendarma komandanto dufoje pafis en la aeron ĉiuj dummomente paŭzis. Sed la urbetanoj, kiuj estis konvinkitaj, ke la komandanto povos fari nenion kun tiom malmultaj soldatoj, denove eniris la kuradon por benzino. La soldatoj kaj la urbetanoj interbatalis ĝismorte sed ekkomprenante, ke tio ne helpos, la komandanto malproksimigis siajn soldatojn de la benzinkamiono.

"Ne gravas, ne indas batali kun ili. Lasu ilin fari tion, kion ili volas. Ili disiĝos per si mem, kiam la benzino elĉerpiĝos. Sed ni pli malproksimiĝu de la benzinkamiono. Sse la benzino ekbrulos, ni estos eksplodigitaj, kaj ni mortos je la vojo de feko!" diris li. La ambulanco forportis la forpasintan ŝoforon. La komandanto kaj la soldatoj rigardis la vilaĝanojn de malproksime.

Dum tiu batalado, luktado kaj baraktado, ĉiuj estis kovritaj per benzino, de la kapo ĝis la piedoj. La kafejisto Mustafa apenaŭ plenigis du plastajn ujojn kaj unu sitelon da benzino, kiam li donis ilin al siaj infanoj, kaj li mem sidis sur la grundo. "Mi multe laboris; sed ĝi valoris. Lasu min fumu unu cigaredon pro plezuro," li pensis. Ŝi elprenis sian envolvajcigaredon kaj siaj okuloj renkontis tiujn de la urbetestro antaŭ ol li ekbruligis sian fajrilon. La okuloj de la urbetestro plilarĝiĝis. "Ne!" li estus krinta, kiam Mustafa ekbruligis sian fajrilon.

La sekvo estas antraŭvidebla. Unuvorte, masakro!

-- rakonto de **Ruŝen Doĝan Nar** el Turkio

-- tradukis **Vasil Kadifeli** el Turkio

30>>

— Sinjoro, mi havas grandan scivolemon pri kial vi ĉiam petas la ĉambrojn 39 kaj mendas la nigran tranĉilon, la botelon kaj la blankan bantukon. Kial tiuj bruoj kaj krioj pri helpo ĉirkaŭ la noktomezo? Kial en aŭgusto? Bonvolu klarigi tion al mi! Mi promesas, ke mi neniam rakontos vian sekreton al iu ajn!

— Ĉu vi sincere promesas, ke vi neniam rakontos mian sekreton?

— Jes ja! — respondis la afliktiĝinta mastro. Via sekreto estos tre sekure gardata de mi por ĉiam.

Kaj la stranga gasto rakontis la sekreton de la ĉambro 39 al la okuleganta kaj gapanta hotelmastro...

Bedaŭrinde por ni la hotelmastro estis tre honesta kaj fidinda homo, kaj ĝis hodiaŭ li rakontis al neniu la sekreton de la stranga gasto de la ĉambro 39...

Se iam li malkovros al mi la sekreton, mi ĝentile rakontos ĝin al vi!

(Nekonata aŭtoro. Tradukis el la portugala lingvo:

Júlio César Pedrosa el Brazilio)

Unua parto :Anekdotoj, rakontoj kaj diversajfoj**Tito**

Tito, la roma imperiestro, rememorante foje vespere, ke dum la tuta tago li faris nenion bonan, diris: "Ho ve, miaj amikoj, mi perdis la tagon."

Filipo Macedona

Kiam oni rakontis al Filipo Macedona, ke multaj atenaj oratoroj kalumnias lin en siaj paroladoj, li diris: "Mi penos pravi per mia vivo kaj miaj agoj, ke ili estas mensogemuloj."

Sokrato

Sokrato salutis junan riĉan homon, kiun li renkontis sur la strato. La riĉulo ne resalutis. La amikoj de Sokrato indignis, sed li diris: "Kial vi tiel koleras? Ke li ne estas tiel afabla, kiel mi?"

Polikrato

Polikrato, la tirano de Samoso, donacis al la greka poeto Anakreono grandan sumon da mono. La poeto akceptis kaj tiel maltrankviliĝis pro la oro, ke li ne povis dormi kelke da noktoj. Tiam li resendis la monon kun la vortoj: "Ĝi ne valoras la maltrankvilon, kiun ĝi kaŭzas al mi."

Naiveco

Knabino sesjara havis katon kaj pupon. Iu demandis ŝin, kiun el la du ŝi preferas. Ŝi ne volis respondi, fine ŝi diris al li en la oreton: "Mi preferas mian katon, sed ne diru, mi petas vin, tion al mia pupo."

Milton

Karlo II^a kai lia frato Jakobo venis al Milton por riproĉi lin, superŝutis lin per insultoj kaj flnis per la vortoj: "Fripono, via blindeco estas puno de l' sorto pro viaj pekoj." La respektinda bardo respondis: "Se la sorto punis min per blindeco pro miaj pekoj, kiaj estis la pekoj de via patro, kiu estis punita per morto!"

Varma pluvo

Du kamparanoj parolis pri la bela vetero, favora por la tritiko, antaŭ nejonge semita de ili. "Se la varmaj pluvoj daŭros — diris unu — ĉio eliros el la tero." — "Kion vi babilas — diras la alia — mi havas du edzinojn en la tombejo; mi timas, ke ili revenos al mi."

Ŝparema kanceliero

Kiam Morus, la kanceliero de Anglujo, estis en malliberejo, kaj oni iutage volis fortondi lian longan

barbon, li forsendis la barbiron dirante: "La reĝo kaj mi procesas pri mia kapo, mi ne faros elspezojn por mia barbo pli frue, ol mi scios, kiu havos la kapon."

Reĝo, komercisto aŭ buĉisto

Malek, la veziro de l' kalifo Mustad, venkis grekojn kaj kaptis ilian reĝon. Li ordonis konduki la kaptiton en sian tendon kaj demandis, kion li atendas de la venkinto. La reĝo respondis: "Se vi faras la militon kiel reĝo, donacu al mi la liberecon; se vi faras ĝin kiel komercisto, vendu min; se vi faras ĝin kiel buĉisto, ordonu mortigi min." La turka militestro donacis al li la liberecon.

Al kio oni povas kutimi

Pastro vidis kamparaninon, senhaŭtigantan angilojn. "Kiel vi povas esti tiel kruela — diris li al ŝi —, ĉu vi ne komprenas, ke la malfeliĉaj bestoj suferas?" — "Ah — respondis ŝi —, mi faras tion jam de dudek jaroj, kaj nun ili sendube tute kutimis al tio."

La grafo de Grancé

Kiam la grafo de Grancé estis vundita per kuglo en la genuo, la ĥirurgiistoj faris tranĉojn, por trovi la plumbon. Fine perdante la paciencon, la grafo demandis, kial ili tiel turmentas lin. "Ni serĉas la kuglon" — diris ili. "Kial vi ne diris tion pli frue — ekkriis la grafo — mi havas ĝin en la poŝo."

Dek konsiloj de Jefferson por la praktika vivo

1. Prokrastu neniam ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ.
2. Ne trudu al alia persono laboron, kiun vi mem povas plenumi.
3. Ne elspezu monon pli frue, ol vi ĝin posedas.
4. Aĉetu neniam tion, kion vi ne bezonas.
5. Evitu la fieron, ĝi malutilos vin pli multe, ol la malsato, soifo kaj malvarmo.
6. Neniam bedaŭru, ke vi tro malmulte manĝis.
7. Kion vi faras, faru volonte.
8. Ne maltrankviliĝu pri la malbonoj, kiuj okazos neniam.
9. Rigardu la aferojn ĉiam de ilia bona flanko.
10. Kiam vi koleras, kalkulu ĝis dek, antaŭ kiam vi paraios: se vi estas tre kolera, kalkulu ĝis cent.

(daŭrigota)





Mauricio do Valle (Brazilio)

de Poppie Nongena” en kiu ludis tre bonaj nigraj kaj afrikanaj aktoroj.

Kompreneble, la monda rekono ne estas la sola kriterio, sed estus ankoraŭ pli justa se ekzistus ia

Sydow, aŭ Erland Josephson el Svedio.

Nun Bolivud-filmoj ankaŭ estas ŝatataj kaj spektataj tra la mondo. Sed tamen, kulture kaj industrie, la usona kaj brita regado ankoraŭ ne finiĝis. Mi lastatempe spektis sudafrican filmon en televido.

“La Longa Vojaĝo de

monda ordo, kie ne ekzistas ekonomia hierarkio kaj ni povas rekoni ĉiujn bonajn filmaktorojn tra la mondo samtempe kaj egale. Aliflanke, kvalito trovas siajn spektantojn, kie ajn ĝi estas. Eble tiaj filmoj farus pli etan giĉeton, sed ĝia valoro estus konata.

Saluton al ĉiuj geaktoroj, kiuj ludis kaj ludas en la nordo, sudo, oriento, kaj okcidento, en mallongaj aŭ longaj filmoj!...

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal**
el Büyükada insulo – Istanbul
16-a de marto 2022

* ‘Cinematheque’ estas membro-bazita kultura asocio aŭ organizaĵo pri filmoj kiu enkorpiĝas ankaŭ biblioteko pri kino kaj kinoarto. En Istanbul ‘Sinematek’ asocio troviĝis proksime de Taksim placo en la centro de la urbo. Sinematek estis fermata dum la puĉo de la jaro 1980.

La stranga gasto de la ĉambro 39

am — tio okazis en la monato aŭgusto — iu viro eniris en hotelon, kaj petis la akceptiston voki la hotelmastron. La mastro venis, kaj la kliento alparolis lin mallaŭte:

— Ĉu la ĉambro 39 estas disponebla?

La hotelmastro respondis “jes”.

— Bone! Do mi luprenos ĝin por hodiaŭ.

Antaŭ ol iri al la luita ĉambro, li petis de la mastro unu nigran tranĉilon, unu botelon kaj unu blankan bantukon.

La mastro konsentis kaj liveris al la gasto ĉion, kion li petis... ne sen miro pri la stranga kaj nekutima peto de la gasto.

La viro eniris sian ĉambron, kaj ne petis manĝaĵon, trinkaĵon aŭ ion alian.

Iom post la noktomezo, la hotelmastro ekaŭdis strangajn voĉojn kaj bruojn el la ĉambro de la viro. La voĉoj kriis:

— Helpu! Helpu!

Tamen la hotelmastro nenion faris, kaj al neniu li parolis pri tio.

La sekvintan matenon, kiam la kliento iris al la hotela gastakceptejo por pagi la luon kaj redoni la ŝlosilon, la hotelmastro, antaŭ ĉio, petis ekzameni la ĉambron. Li iris tien, ekzamenis la ĉambron, sed trovis ĉion em ordo. Nenio en ĝi ŝajnis eksterordinara aŭ for sia kutima loko.

La gasto pagis sian fakturon, donis bonan drinkmonon al la akceptisto kaj foriris ridetante el la hotelo.

La hotelmastro estis tiam tre surprizita, sed ne

tradukaĵo de Júlio César Pedrosa el Brazilo

rakontis al la aliaj hotelaj laboristoj pri la okazaĵo, pri tio, kion li aŭdis. Li ja komencis dubi pri si mem, ĉu tio estis vera aŭ ne.

Post unu jaro, en monato aŭgusto, la stranga gasto revenis al la hotelo, kaj denove petis voki la hotelmastron. La kliento luprenis la saman ĉambron 39, kaj petis de la mastro la samajn objektojn kiel en la antaŭa gastado.

Tiun fojon la mastro estis ankoraŭ pli scivola pri la gasto kaj liaj strangaj mendoj kaj sinteno. Li ne sukcesis dormi, kaj je noktomezo li iris al la ĉambro 39, kaj komencis aŭdi la samajn strangajn bruojn kaj voĉojn, kiuj kriis petante helpon.

La sekvintan tagon, antaŭ ol la kliento foriros, la hotelmastro ekzamenis la ĉambron 39, kaj vidis, ke ĉio estas tute en ordo; la kliento pagis sian fakturon, donis drinkmonon al la akceptisto kaj feliĉa adiaŭis ĉiujn.

Post la foriro de la stranga gasto, la hotelmastro longe pensis pri ĉio: "Kial li ĉiam postulas la ĉambron 39? Por kio la blanka bantuko? Kaj la nigra tranĉilo? Kial la botelo? Kaj la bruoj, la krioj, la petoj pri helpo..."

La mastro fakte ne sukcesis atingi konvinkan respondon al tiuj demandoj. Li do atendis senpacience la sekvontan jaron, kiam en la monato aŭgusto la stranga gasto eble revenos.

Nova monato aŭgusto alvenis, kaj kun ĝi la stranga kliento. Li petis la akceptiston voki la hotelmastron, kiu tuj aperis. Post postuli la ĉambron 39 kaj mendi la kutimajn varojn, la gasto aŭdis la peton de la hotelmastro:



32>> jen ĝi nun vivas kiel planto. Mi kredas, ke Kumagusu pruvis kaj indikis al ni per biologio, folkloro, filozofio kaj multaj aliaj, ke ĉio en la mondo ne havas limon kaj ĉio estas ekzistaĵo valora.

EŬROPANTO

Ĉu vi ankoraŭ ne aŭdis pri Eŭropanto?

Eble, ĉar ĝi ne ekzistas. Eŭropo ankoraŭ ne havas komunan lingvon. Verdire jam naskiĝis multaj provadoj por elimini tiun ĉi gravan problemon. Se ni, eŭropanoj ne trovos baldaŭ konvenan solvon, tiam laabela ĥaoso kaŭzos lingvajn miskomprenojn kaj sufokigos la klopodon por estigi unuecon sur nia kontinento.

Ankaŭ ni, esperantistoj, senĉese sieĝas la potenculojn kaj pruvadas, ke nia amata lingvo Esperanto povus plenumi tiun ĉi rolon, sed ni ĉiam trovas murojn kaj oni forĵetas nian ideon.

Antaŭ nelonge ankaŭ Dr. Molnár Lajos en Hungario sendis sian opinion pri ĉi temo al diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj, sed „la estimataj redaktotoj“ ne aperigis lian kontribuadon, eĉ lasis lin senresponde.

Mi scias, Vesperto estas amatora eldonaĵo kaj ĝin legas nur malmultaj homoj. Ĝi ne povas, ne volas konkuri kun landaj gazetoj. Tamen mi decidis aperigi mallongigitan artikolon de Dr. Molnár Lajos:

„Mi estus volinta prui (por kiel eble plej multaj homoj), ke laŭ lingva vidpunkto antaŭ EU staras 3 vojoj:

1. Almenaŭ por iom da tempo gardi la lingvan diversecon. Tiu ĉi vojo estas ege multekosta kaj samtempe la malplej efika, - sed (eble) ne danĝerigus la unuopajn, naciajn lingvojn kaj kulturojn.

2. Solvi la lingvan problemon per uzado de unusola nacia lingvo. (Estas egale, ĉu oni uzus anglan, germanan, hispanan, francan, portugalan ktp.) tiu ĉi – cetere treege efika – vojo kondukas al neniigo de la aliaj naciaj lingvoj. La lingvoj de malgrandaj nacioj malaperus unuaj...

3. Enkonduko de neŭtrala, facile ellernebla, sufiĉe belsona, por ĉiuj nacioj akceptebla ponto – lingvo, kiu ne danĝerigas la etnajn lingvojn kaj kiu donas al neniuj nek malavantaĝon, nek senmotivan avantaĝon.“

Eŭropanoj devus pripensi, pridiskuti demokrate, solvi... La monan problemon oni pli bone komprenas.


Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotova

Sonĝo ene de sonĝo

Prenu ĉi tiun kison sur la brovon!

Kaj, disiĝante de vi nun,
tiom multe mi konfesu -
vi ne eraras, ke vi opinias,
ke miaj tagoj sonĝo estas;
Tamen se la espero forflugis
en nokton, aŭ en tagon,
en vizion, aŭ en nenion,
ĉu do la malplio foriris?
Ĉio, kion ni vidas aŭ ŝajnas
estas nur sonĝo ene de sonĝo.

Mi staras meze de muĝado
de surfoturmentita marbordo,
kaj mi tenas en mia mano
grajnojn de la ora sablo -
Kiom malmultaj! Tamen kiel ili rampas
tra miaj fingroj al la profundo,
dum mi ploras — dum mi ploras!
Ho Dio! Ĉu mi ne povas ekkapti
ilin kun pli streĉita agraf?
Ho Dio! Ĉu mi ne povas savi
iun el la senkompata ondo?
Ĉu ĉio, kion ni vidas aŭ ŝajnas
estas nur sonĝo ene de sonĝo?



poemo de **Edgar Allan Poe** el Usono
tradukis **Vasil Kadifeli** el Turkio

Solvo de la krucvort-enigmo



A	S	T	R	A
S	U	P	E	R
O	N		T	B
P	A	J	N	O
E	S	T	I	S

E	N	O	N	O
T	A	G	O	N
U	N		T	A
K	O	D	O	N
A	B	O	N	I

Eroj el la libreto „MINAKATA Kumagusu“

TONIŜI Jooko, *Esperanta traduko EGAWA Harukuni*

D-ro L.L.Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto kaj Minakata Kumagusu vivis en la sama epoko. Ambaŭ klopodis por „la mondo sen muro“ kaj kontribuis por la mondo krei „kulturon de la paco“. Por ke la vivo de Minakata Kumagusu estu konata tra la tuta mondo, mi tradukis en Esperanton, lingvon senmure egalan al ĉiuj nacioj.

Se oni demandus: „Kia homo estis MINAKATA Kumagusu?“, iu respondus, ke li estis „plantologo“. Aŭ alia nomus lin „folkloristo“. Inter la respondoj povus esti homo, kiu persistas: „Li estis certe mondfama miksomiketologo pri la studo de miksomiketoj (mycetozoa).“ Kaj ankaŭ homo, kiu klarigas: „Ne, li estas naturesploranto inkluzive de ĉio menciita.“ Ĉiuokaze, eĉ homoj vivantaj najbare de Kumagusu ne povis trovi taŭgan nomon por lia laboro. Inter ili estis kelkaj, kiuj nomis lin „giganto“ kaj ni provu vidi tian vivon de Kumagusu laŭ la preparoloj de diversaj homoj.

Ĉar Kumagusu havis tian specialan ĉieldoton, ke li nenion forgesis eĉ post unufoja memoro, plej allogaj ludoj al li estis legado kaj transskribado. Eĉ en la tempo de la elementa lernejo li amis legadon kaj lernadon. Sed lia patro Jahei ne aĉetis por li sufiĉe da libroj, kajeroj kaj kraĵoj pro la penso, ke la infano de komercisto ne bezovas edukon. Pro tio li ofte vizitis amikojn kaj tie legis la unuan enciklopedion kun ilustraĵoj en Japanio, „Ŭakan Sansai Zue“ kaj aliajn librojn. Pruntepreninte ĝin, li revenis hejmen kaj ektransskribis la tuton de tiu sama tago. Nun restas multaj transskribitaj kajeroj kiel el „Ŭakan Sansai Zue“, naturhistoria libro de Ĉinio ktp., kiujn li faris en la aĝo de ok aŭ naŭ jaroj.

Tamen, ĉar li jam fariĝis tridek kvar jarojn aĝa kaj devis labori en profundaj montoj, li iam verkis maĝojan poemon: „Malnovaj amikoj, ĉiuj sukcesis en la vivo. Sed ve, kial mi sola en vintra nokto malvarma devas dormi en tabioj malsekaj (tabio: japana mola piedvesto kovranta ĝis maleolo) de intermonta akvofluso?“ Ankaŭ tie li trovis la raran mikrobion *Cymbidium Lancifolium*, pri kiu li respondis: „La lokon sciigis al mi fantomo.“ Ŝajnas, ke la fantomo sciigis al li ne nur unufoje, pri kio li skribis jene: „Kvankam ĉiuj primitivaj homoj havis


superpovon interparoli kiel mi kun la fantomoj de granda naturo, nuntempaj homoj eble jam perdis ĝin pro la vivado dependanta de artefaritaj aĵoj.“

Tiutempe la registraro de ilustraĵoj kaj specimenoj pri multaj specioj de mikroboj kaj miksomiketoj jam estis ellaboritaj de li. La tempo, kiam li donace sendis la specimenojn de miksomiketoj al la planta fakultato en Brita Muzeo estis ĝuste la jaro, kiam li edziĝis al Macue. Oni diras, ke ĉar en lia kabineto senorde kuŝis mikroskopo, libroj kaj skribataj manuskriptoj, remetonte ilin Macue estis skoldita. Do, ŝi ne devis balai eĉ la ĝardenon, ĉar tie li flegadis miksomisetojn sub velkofolioj. Sur la skribotablo ofte kuŝis fekaĵeroj pro tio, ke li flegadis ankaŭ miksomiketojn en la fekaĵoj de bovo kaj ĉevalo.

En 1907 naskiĝis la unua filo Kumaja. Tiutempe, la japana registaro en la erao Meiji proklamis la leĝon: „kuna apoteozo por unu komunumo“. Tio signifas, ke ni apoteozu nur unu ŝintoisman templon por unu vilaĝo aŭ urbo, malkonstruinte aliajn ŝintoismajn kapelojn kaj templojn por klanoj. Alivorte estas, ke vilaĝanoj forĵetu sian dion, al kiu ili kultis ĝis nun, kaj kreu je la dio, kiun la registaro direktis. Kumagusu forte kontraŭis. La ĝardenoj kaj la arbaroj de temploj havis lokojn, kie vivadis multe da kriptogamoj kaj miksomiketoj, kiujn li studadis. Se ia specio pereis unufoje, li sciis, ke ĝi neniam reaperos en la mondo. Kaj pro malapero de la dioj, al kiuj oni kultis ĝis nun, koro al koro de homoj disiĝos ĉiu aparte kaj malaperos la varmeco kaj afableco de la vilaĝanoj kaj kamparanoj. Dum dek jaroj li protestadis kontraŭ la aŭtoritatuloj de la ŝtato kaj gubernio dirante: „La leĝo detruos la ekologian sistemon de la naturo, perdigos la bonkorecon de la homoj kaj fine alportos nenian bonan frukton al la estonta Japanio.“ Ĉar li tro forte movadis kontraŭ ĝi, arestita li spertis malliberejan vivon en 1910.

Plue li klarigis per ilustraĵoj, ke spirito kaj materio ne estas apartaj kaj ili havas rilaton ege influantan unu la alian. La socia strukturo de la nuntempa Japanio devenis el la penso, ke spirito kaj materio estas apartaj, kaj nun ĝi renkontas stagnadon. Tion Kumagusu antaŭvidis kaj timis. Pro sia esenca penso, ke ĉio ne havas muron, li eble interesiĝi speciale pri la miksomiketoj. Ĉar jen ĝi iam aperis en animala formo,



SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

www.CDELI.org
 RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds